Protokolo de la 31-a Konferenco de REU

La 21-a — 22-a de aŭgusto 2021,
Dagestano, la sanatorio «Kaspij»

Enkonduko

La Konferenco okazis enkadre de «Rusiaj Esperanto-Tagoj — 2021» en Dagestano, en la sanatorio «Kaspij», dum la lastaj du tagoj de la aranĝo.

Partoprenis 17 personoj: 11 surloke kaj 6 distance per «Zoom». Ne ĉiuj ĉeestis dum la tuta tempo, iuj vizitis la Konferencon por nelonge.

Surlokaj partoprenantoj: Aliverdijev A. A., Basov G. F., Gudskov N. L., Junusov A. G., Kuznecova J. N., Lebedev A. A., Minin V. J., Nadikova J. M., Salomatov A. J., Ŝaposnikova L. V., Vasiljeva L. V.

Distancaj partoprenantoj: Bronov S. A., Bronŝtejn M. C., Gonĉarova I. G., Melnikov V. V., Mitin A. S., Pogorelaja S.

Por surlokaj voĉdonadoj estis disdonitaj mandatoj. La voĉdonadoj por la distancaj partoprenantoj estis aranĝitaj foje pere de la zoom'a voĉdonsistemo (en pli gravaj okazoj, kiam antaŭvideblis diversaj opinioj), foje pere de simpla voĉa pridemandado por rapidigi la aferon (en pli simplaj okazoj, kiam ŝajnis evidenta unuanima rezulto).

La Konferenon observis sen voĉdonrajto (ne estas membroj de REU, ne estas konsiderataj kiel partoprenantoj de la Konferenco): Loskutova T., Solovjova M. kaj kelkaj aliaj personoj.

Per «Zoom» estis farita plena registraĵo de la Konferenco, ĝi estas publikigita en la Jutubo-kanalo de REU (tri kunvenoj, la suma daŭro estas 5 horoj kaj duono):
`https://www.youtube.com/playlist?list=PLRxA08s5A-SywR0f7as8EHh0gwCgy3aHi`

Krome, la protokolanto Gennadij Basov skribis koncizajn notojn permane surpapere.

Tiu ĉi dokumento estis preparita de Aleksandro Lebedev, kiu traspektis la registraĵojn kaj tralegis la notojn. Foje en [rondangulaj krampoj] estas enmetitaj malgrandaj komentoj.

1 La unua kunveno, la 21-an de aŭgusto, matene

1.1 Elekto de la gvidorganoj de la Konferenco

[La tempo estas: 10:20.]

Aleksandro Lebedev malfermas la Konferencon, salutas la partoprenantojn.

Elekto de la gvidorganoj de la Konferenco

Aleksandro Lebedev proponas sin kiel la kunvengvidanton kaj proponas Gennadij Basov kiel la protokolanton kaj la kalkulanton.

La gvidorganoj estas elektitaj unuanime:
Kunvengvidanto — Aleksandro Lebedev;
Protokolanto — Gennadij Basov;
Kalkulkomisiono — Gennadij Basov.

1.2 Kalkulo de la partoprenantoj, difino de la kvorumo por voĉdonadoj

La kalkulkomisiono (**Gennadij Basov**) kalkulas la partoprenantojn.
Ĉeestas (momente) 6 partoprenantoj surloke, 4 distance, sume 10.
Do, la kvorumo por voĉdonadoj estas 6 partoprenantoj.

1.3 Akcepto de la tagordo

Aleksandro Lebedev proponas tagordon de la Konferenco (la dosiero disdonita papere al la surlokaj partoprenantoj, anticipe sendita rete al la distancaj).
`http://reu.ru/prenu/tagordo_de_la_31_a_konferenco_de_reu.pdf`
De **Vladimir Minin** venas propono por la tagordo — pridiskuti moderigadon de la landa dissendolisto.
Nikolao Gudskov proponas meti tiun ĉi temon en la punkton «Eventuala elekto de aliaj komisiitoj».
Kun la aldono pri «moderigado de la landa dissendolisto» la proponita tagordo estas akceptita.
Por: 9 surloke, 3 distance.
Kontraŭ: 0, 0.

La akceptita tagordo de la 31-a Konferenco de REU

1. La unua kunveno
    1. Registrado de la partoprenantoj, ricevo de la mandatoj, testado de zoom-konekto, agordo de teknikaĵoj.
       Saluta vorto. Malfermo de la Konferenco.
       Elekto de la gvidorganoj de la Konferenco:
       - kunvengvidanto(j);
       - protokolanto(j);
       - kalkulkomisiono.
    2. Kalkulo de la kvanto de delegitoj.
    3. Akcepto de la tagordo de la Konferenco.
    4. Raporto de la Estraro pri la agado post la antaŭa Konferenco.
    5. Raporto de la Kontrol-revizia komisiono.
    6. Debatoj kaj pritaksoj.
       Pritakso de la laboro de la Estraro (voĉdonado).
       Pritakso de la laboro de KRK (voĉdonado).
    7. Raportoj de regionaj aktivuloj kaj kluboj
2. La dua kunveno
    1. Elektoj
       Proponoj kaj sinproponoj por la posteno de la Prezidanto.
       Elekto de la Prezidanto.
       Elekto de la Vicprezidanto(j).
       Elekto de la Estraro.
    2. Elekto de la Kontrol-revizia komisiono.
    3. Eventuala elekto de aliaj komisiitoj, se necesos.
       Moderigado de la landa dissendolisto

3. La tria kunveno

    1. Raporto pri la unua Kunveno de la novelektita Estraro.
    2. Pripenso de estontaj aranĝoj, ideoj por nova agadperiodo.
    3. Diversaĵoj.
    4. Agordo de formalaĵoj. Fermo de la Konferenco.

1.4 Raporto de la Estraro

Anticipe al la partoprenantoj estis disdonita papere la kajero «Materialoj por la 31-a Konferenco de REU» kun la raportoj de la Estraro. Al la distancaj partoprenantoj la sama dosiero estis anticipe sendita. `http://reu.ru/prenu/materialoj_por_la_31_a_konferenco_de_reu.pdf`

Aleksandro Lebedev kurte prezentas tiun raporton (legu la supre menciitan dosieron).

Dum prezentado de la raporto oni aldonas/pridiskutas la jenajn aferojn:

Eldonagado

Nikolao Gudskov raportas pri la branĉo «Eldonagado» (legu la supre menciitan dosieron).

KAOEM

Vladimir Minin: Kion vi povas diri pri Masjagin, kiu estis komisiito pri kontakti la «Komisionon pri Azia-Oceania Esperanto Movado»?

Aleksandro Lebedev: Masjagin ne plu estas komisiito jam antaŭ du jaroj, ĉar la pasinta Konferenco ne konfirmis, ke li restu je tiu posteno.

Vladimir Minin: Ĉu neniu estas nun komisiito pri kontaktoj kun KAOEM?

Aleksandro Lebedev: Neniu estas.

Vladimir Minin: Tiuj estraranoj de KAOEM skribis al mi kaj petis informi ilin pri ĉio anstataŭ Masjagin. Ili ne sciis, ke Masjagin estis eksigita.

Aleksandro Lebedev: Fakte, mi memoras, ke ankaŭ al mi iu el ili skribis, kaj mi respondis, ke Masjagin estis eksigita. Ni povas iun elekti poste kiel komisiiton pri tiuj aziaj aferoj...

Pri la paĝaro

Abdurahman Junusov pri la paĝaro de REU: Dum la preparado al tiu ĉi aranĝo [RET] mi preskaŭ ĉiutage vizitadis tiun paĝaron. Kaj mi konstatis, ke estas sufiĉe multe da malnovaj kaj malnoviĝintaj materialoj, kaj ĝi ne ofte renoviĝas.

Aleksandro Lebedev: Nu, jes, necesas ĝin renovigi. Mi esperas, ke mi daŭrigos tiun aferon pri renovigado de la paĝaro.

Gennadij Basov: Akumulita materialo en tiu retejo estas o-ho-ho, necesas iamaniere transmeti ĝin en novan paĝaron. Kaj tio estas tre malfacile. En malnova kodo kompreni kaj korekti ion estas tre malfacile, des pli, ke faris ĝin ne Aleksandro.

Aleksandro Lebedev: Nu, jes, en la 2019-a mi komencis programadi novan paĝaron kun intenco transmeti ĉion el la malnova...

Gennadij Basov: Estas granda laboro...

Nikolao Gudskov: Nu, principe la paĝaro funkcias. Kaj la plej bona estas malamiko de la bona.

Abdurahman Junusov: Almenaŭ ion kosmetikan fari. Ne estas bone, ke tie dum longa tempo pendas anonco pri ies forpaso.

Aleksandro Lebedev: Necesas ne pigri meti novaĵojn tien.

Valentin Melnikov: Jes, novaj informoj puŝas la malnovajn suben, kaj tiuj iĝas kvazaŭ arĥivo.

Pri grupoj en sociaj retoj

Nikolao Gudskov: Tio estas granda problemo, ke ĉiam aperas novaj kaj novaj sociaj grupoj. Kaj mi ne povas observi ilin ĉiujn. Kaj pri iuj mi eĉ ne scias. Por kio ili necesas? Por disipi la fortojn?

Aleksandro Lebedev: Por tiuj, kiuj, ekzemple, sidas en Telegramo kaj ne sidas en VKontakte. Estas grave, ke la informoj estu kopiataj al ĉiuj placetoj por atingi ĉiujn grupojn de abonantoj.

[Kelkaj diskutas pri sekureco, blokebleco, oportuneco de diversaj sociaj retoj...]

Pri REU-membreco de REU-estraranoj kaj pri financa jaro

Tatjana Loskutova: Ĉu mi povas demandi? Min interesas, kial estraranoj de REU ne pagas la aliĝkotizojn? Do, ne estas estraranoj? De du jaroj Svetlana Smetanina ne pagis, kaj vi ankaŭ ne pagis ĉi-jare la aliĝkotizon.

Aleksandro Lebedev: Ni pagis la aliĝkotizojn. Mi pagis antaŭ iom pli ol semajno kaj Svetlana pagis antaŭ tri tagoj. Ne estas iu regulo, kiam konkrete en la jaro oni devas pagi. Mi atendis, kiam pagos nia asocio «MASI» [kolektos minimuman kvanton da personoj por la kluba membreco], kaj Svetlana, verŝajne, simple forgesis, do mi memorigis al ŝi.

Tatjana Loskutova: Sed en la jaro, kiam okazas elekta Konferenco, oni verŝajne devas pagi komence de la jaro. Kaj Svetlana ankaŭ pasintjare ne estis membro.

Aleksandro Lebedev: Oni devas pagi iam ajn antaŭ la Konferenco por esti plenvaloraj membroj. Ni pagis, do en ordo. Kaj pasintjare ne okazis Konferenco.

Gennadij Basov: Jen estas levita tiu ĉi demando. Kiam mi iĝis membro de Kontrol-revizia komisiono, mi ne trovis ie mencion pri financa jaro. Ne estas konkreta regulo pri tiu ĉi afero. Kiam komenciĝas kaj finiĝas financa jaro? Ĉu la unuan de januaro? Aŭ meze de la jaro, de Konferenco al Konferenco?

Aleksandro Lebedev: La 1-an de januaro, kiel en normala librotenado en Rusio.

Gennadij Basov: Do tiam, en tiu ĉi periodo oni devas kiam ajn pagi la kotizon, kaj necesas ĝin konsideri por tiu ĉi jaro.

Nikolao Gudskov: Estis iam jena regulo, mi povas diri. Se homo estis membro de REU, ekzemple, en la 2020-a jaro, do li aŭtomate restas membro de REU ĝis fino de la la sekva, 2021-a jaro...

Aleksandro Lebedev: Ne.

Nikolao Gudskov: ...Ĝuste tio, ĉar dum la 2021-a jaro li povas iam ajm pagi la kotizon por la 2021-a. Almenaŭ iam estis tiel, en antaŭaj tempoj.

Aleksandro Lebedev: Ne, tio estas malĝusta. Eĉ se tio ekzistis, mi opinias, ke tio estis nekorekta praktiko.

Nikolao Gudskov: Tamen, oni ne fiksis, en kiu monato de la jaro oni pagu la kotizon.

Aleksandro Lebedev: Jes. Kaj se mi pagas la kotizon la 1-an de decembro, do mi estas membro dum unu monato, ĝis fino de la jaro.

Nikolao Gudskov: Reale, en komenco de la jarmilo oni opinis, ke tia homo estas membro ĝis fino de la sekva jaro. Almenaŭ en la 2000-aj jaroj tiel estis, poste mi ne plu okupiĝis pri financoj. Eble, estas malbone, mi ne scias.

Aleksandro Lebedev: Mi ne konsentas kun tiu ĉi aliro, nun tio ne estas.

Gennadij Basov: Nu, ni povas diskuti tion poste aparte.

1.5 Raporto de la Kontrol-revizia komisiono

Prezidanto de la KRK **Gennadij Basov** raportas.

Gennadij Basov: Mi petas pardonon, ke en tiujn ĉi «Materialojn por la 31-a Konferenco de REU» trafis nur la rusa varianto. La rusa varianto estis verkita por raportaj celoj por instancoj, por ekstera publiko. Tamen, verdire, la Esperanta varianto ne tro diferencas...

Aleksandro Lebedev: Ŝajne, vi ĝin ne sendis al mi, pro tio mi ĝin ne enmetis en la «Materialojn».

Gennadij Basov: Ĉar ni longe poluris ĝin. La rusan varianton ni rapide verkis, sed ĝuste la Esperantan varianton faris longe. Estis kelkaj rimarkoj, sufiĉe trafaj.

Do. Ni rigardis la agadon, kontrolis la moncirkuladon, kaj ni povas konkludi, ke ĉiu ricevita mono estis elspezita por la statutaj celoj. En antaŭaj perionoj estis iuj malklaraj ciferoj, sed ĉi-foje ĉiuj transpagoj estas absolute klaraj, almenaŭ por mi. Kaj ĉiuj elspezoj konformas al la statutaj celoj. Do, ni pensas, ke ni devas konsideri la laboron de REU en la raporta periodo akceptebla, kontentiga.

Tamen, bedaŭrinde, restis postsekvoj de la antaŭa agado. Ĉar ne estis evoluita sistemo de financado de projektoj kaj programoj. Pri kio temas? Al la sekva jarperiodo devas aperi programoj kaj projektoj. Por ke ili estu financataj de la organizaĵo. Bedaŭrinde, ĝis nun tiuj projektoj sporade aperas. Kiel, ekzemple, tiu projekto «Unu leciono por lernejanoj». Estas bonega projekto, laŭ mi, sed ĝi ne trafis al buĝeto, jen kia problemo. Kiom pagis ni por tiu ĉi projekto? Du mil rublojn, ŝajne, ĉu? Nur premio, ŝajne, estis.

Aleksandro Lebedev: Jes, la premio kaj kancelariaĵoj (tiuj honorfolioj).

Gennadij Basov: Jes. Kaj tute mem projekto estas interesa, sed ĝi elspezas tre malmulte da mono. Kiel mi supozas, ĝuste laŭ la statutaj celoj, se konsideri tion, tio estas grava laboro. Kaj ĝi meritas pli da investado en tiu ĉi afero. Do, tiu, kiu lanĉis tiun projekton [tiu «tiu» estas Irina Gonĉarova], devas pripensi, kiom necesas elspezi por tiu ĉi agado por ke ĝi estu efika por strategiaj celoj de nia organizaĵo. Nu, kaj simile.

Mi vidis en la raporto, ke la projekto de buĝetado estis lanĉita. Estas tre bona iniciato, sed ĝin necesas daŭrigi. Tio estas bona rimedo por vidi, el la financa fidpunkto, kiel organizi pli efektivan agadon.

Buĝetato ne estas por si mem. Ĝi estas bona rimedo. Necesas ĉion bone konsideri, kaj, eble, eĉ lanĉi sistemon de grantoj. Kial ne? Ekzemple, se iu iniciatas iun projekton aŭ iun programon, do eblas ricevi monon por la afero.

Do, ni ĝuste tion notis: ke en REU ne estas evoluita sistemo de financa subteno de projektoj kaj programoj.

Kaj mi ŝatus diri el mia sperto pri laboro de nekomercaj organizaĵoj: fakte, normala nekomerca organizaĵo, pli-malpli evoluita, neniam estas plene financata de kotizoj. Kotizoj ordinare kovras 10–12 procentojn de realaj bezonoj. Ne pli. Ĉion ceteran organizaĵo devas perlabori. Estas sistemo de tiel nomata «fundraising»-aktivado [«fundraising» — venigo de monrimedoj: kolekto de mondonacoj, subvencipetado, serĉado de sponsoroj, akiro de grantoj kaj tiel plu]. Kotizo nur simple rolas por distingi: ĉu iu estas membro aŭ ne membro. Sed kontentigi ĉiujn bezonojn de la organizaĵo — apenaŭ tio povas esti. Kiel evoluigi tion — mi ne scias, sincere dirante. Necesas pensi. Kromlaboroj. Necesas serĉi iujn eblojn. Partopreni en iuj grantaj konkursoj? Mi ne scias, ĉu nia agado konformas al iu. Nu, ekzemple, tiuj ekologiaj problemoj, eblas verki iun granton, peton pri granto. Eble ion alian. Sed Esperanta agado... mi ne scias, necesas pensi. Ĉu ni povus trovi iun fonduson, kiu povus financi nian agadon? Estas malfacile.

Nu, pri librotenado mi notis, ke ne estas farata librotenado. Tio estas konsekvenco de tio, ke la mona cirkulado de la tutlanda organizaĵo estas malpli granda ol en iu ordinara butiko en la urbo. Dungi libroteniston kaj fari ĉion laŭ reguloj, kiel devas esti en nekomercaj organizaĵoj — ni simple disipos la tutan kolektitan monon por financado de tio.

Aleksandro Lebedev: Laŭ mi, necesas almenaŭ fari normalan bankan konton.

Gennadij Basov: Jes, mi tion tralegis en la «Materialoj...». Tio estas laŭdinda afero, kaj jam ne la unuan fojon ni tion levas. Ni havis tiun konton...

Nikolao Gudskov: Ne unufoje.

Gennadij Basov: Eĉ ne unufoje. Sed oni pro iuj misoj simple blokis ĝin. Kaj mi eĉ ne scias, ĉu revenis tiu mono?

Nikolao Gudskov: Revenis ĉio, sed...

Gennadij Basov: Do, pri la konto estas bona ideo, eĉ subteninda. Sed ĉiam estas risko, ke la ŝtato sian manon sur tiun monon metos. Krome, estas alia problemo. Ĉiuj elspezoj devas esti dokumentitaj, ĉu per fakturoj, ĉu per alio. Aliel la kontrolaj organoj povas konsideri, ke tio estas distribuado de mono inter membroj. Kaj tio estas severe malpermesita en nekomercaj organizaĵoj. Komercaj organizaĵoj povas la profiton distribui inter membroj. Sed en la nekomercaj estas strikte malpermesita disdonado de kolektita mono. En tiu senco, ke oni kolektis monon kaj poste al iuj konkretaj personoj simple disdonas. Kvankam tio eblas, ekzemple, kiel premio. Sed mi ne scias, kiel dokumenti tiun aferon. Eblas pagi salajron, sed tiam necesas pagi impostojn. Do, estas tikla demando.

De alia flanko, kompreneble, kiam estas privata konto, tiam estas minaco, ke tiu mono povas malaperi.

Aleksandro Lebedev: Kaj tio jam okazis.

Gennadij Basov: Kaj tio jam okazis. Do, misagoj estis, mi povas diri.

Nikolao Gudskov: Nu, tio okazis ne pro superaj aferoj, sed pro internaj aferoj en REU.

Aleksandro Lebedev: Do, Geĉjo, vi timas, ke la ŝtato povas iel-tiel meti sian manon sur la monon en la banka konto. Sed tio estas via hipotezo, kiu ankoraŭ ne okazis, kaj eble estas nur surbaza timo. Kaj aliflanke, perdo de la mono, kiu estis konservita en personaj kontoj, jam okazis en la realo, do ne estas senbaza timo.

Gennadij Basov: Reale jes, vi pravas. Mi subtenas tiun ideon. Eble, ankoraŭfoje reveni al tiu afero. Kaj la kotizojn ricevadi al la konto rekte. Estas normala afero.

Nikolao Gudskov: Estas normala afero, sed ni siatempe konvinkiĝis, ke tio estas ne oportune. Havi kasan libron kun mono, kiun ricevas iu respondeca persono, estas la plej trankvila kaj simpla afero. Ĉar pri konto — jam vere devas esti profesia librotenisto. Kaj kiam ni havis la konton, ĝi estis malplena. Kaj ni faris tiujn raportojn nulajn. Kaj tio estis bona afero ĝenerale, sed tiam oni de nekomercaj organizoj tion postulis. Nun oni ne nepre postulas. Do, ni nun post iuj malfacilaĵoj dume vivas sen tiu konto. Nuntempe tio estas bona situacio, kiu forigas kapdoloron ĝuste pri tiu librotenado kaj tiel plu. Bone, kiam estas sperta persono, kiu povas fari tiujn nulajn raportojn. Iam pri tio lerte okupiĝis Lena Ŝevĉenko, kiu simple sciis, kiel tion fari tre rapide. Kaj ni tre dankis al ŝi, kiam tio estis. Nun tio ne estas, kaj tiuj postuloj ne estas. Dume oni nin lasis en paco pri tiu afero.

Gennadij Basov: Nu, oni lasas nin pace pro tio, ke la mona cirkulado en la organizaĵo estas ne tre granda. 50 mil rubloj jare. Tio estas ridinda sumo. Ne estas interesa por ŝtataj rabistoj.

Tiun demandon pri la oficiala konto tamen necesas esplori ankoraŭfoje. Kaj mi supozas, ke tiu ĉi tasko por la nova Estraro devas esti. Ili esploru kaj trovu la plej bonan varianton por la organizaĵo. Ĉar, kiam la mono troviĝas ĉe privata persono, tiam povas okazi diversaj misoj kaj tiel plu.

Vladimir Minin: Mortoj...

Gennadij Basov: Nu, ne mortoj. Simple, estas misuzoj. Ekzemple, jen, oni donis monon al Seguru, kaj poste Seguru ĉu redonis finfine, ĉu ne redonis. Tiel ne devas esti en nekomercaj organizaĵoj.

Aleksandro Lebedev: Ankaŭ mortoj, kiel prave diris Vladimir. Ekzemple, se mi forpasas, vi ne pruvos al miaj parencoj, ke mi havis iun monon. Oficialaj dokumentoj ne estas, nur neoficialaj dosieroj.

Gennadij Basov: Nu, jes. Do, mi finis. Ĉu estas demandoj?

Vladimir Minin: Jes, estas unu demando. Ĉu vi povas klarigi, kio estas «Kovro de deficito de la sistemo de REU-kontoj»? [Citaĵo el la financa raporto el la «Materialoj...»].

Aleksandro Lebedev: Estas ĝuste pri morto. Ekzistas sistemo de REU-kontoj, similaj al UEA-kontoj. Homo povas doni al REU iun monon por konservado. REU notas, ke en la REU-konto de tiu homo estas tiu mono. Poste la homo povas uzi sian monon. La homo skribas al REU: bonvolu preni jenan sumon el mia REU konto kaj faru pri tiu sumo jenon. Ekzemple, uzu kiel mian membrokozon. Aŭ simple sendu al mi (mi volas repreni monon de sia REU-konto).

La sistemon de REU-kontoj administris Mikaelo Ĉertilov, kaj li tenis ĉe si la tutan monon de tiu sistemo. Li mortis, Svetlana Smetanina turnis sin al la familio, sed ne povis pruvi al ili, ke estis iu mono. La familio ne agnoskis, ke ion ŝuldas. Do, ni perdis tiun monon. Do, evidentiĝas, ke REU akceptis monon de homoj por konservado kaj perdis. Kaj nuntempe, kiam iu skribas al ni, ke li aŭ ŝi volas uzi sian monon el sia REU-konto, ni simple elpagas al tiu homo tiun monon el la kaso. Feliĉe, tio okazas ne tro ofte, sed okazas.

Vladimir Minin: Kaj ĉu granda sumo estis en tiu sistemo?

Aleksandro Lebedev: Necesas kalkuli.

Vladimir Minin: Sed pri kiuj sumoj temas? Ĉu pri milionoj?

Aleksandro Lebedev: Ne. Kelkdekoj da miloj.

Marina Solovjova: Se iu petas tiun monon, de kie vi scias, kiom ĝuste tiu homo havas?

Aleksandro Lebedev: Ni havas la liston en la paĝaro. Kiu kiom havas en sia REU-konto. Sed estas neoficiala afero. Oficialaj dokumentoj ne estas.

Nikolao Gudskov: Fakte, la sama afero kiel la kasa libro. Pri Ĉertilov estis la problemo, ke kun li malapereis ĉio, kio estis en liaj manoj. Kaj la familio ne volis kontakti.

Aleksandro Lebedev: Ĉu estas demandoj al Geĉjo? Komentoj?

Marina Solovjova: Estas tia konkludo: se la mono ne estas tiom granda, tiam lasu la kasan libron.

Sed se ni esperas pri pli bona stato de niaj aferoj, planas ricevi subvenciojn kaj tiel plu, tiam ni bezonas konton. Se iu eksterlandano deziros iam subvencii nian REU, kion ni faros.

Nikolao Gudskov: Se iu eksterlandano subvencios REU-n, REU tuj estos nomita «eksterlanda agento», aŭtomate.

Aleksej Salomatov: Estas mirinde, ke ĝis nun tio ne okazis.

Nikolao Gudskov: Tio ne okazis, ĉar ĝis nun ni neniam oficiale ricevis iun monon el eksterlando.

Gennadij Basov: Ĝuste pro tio mi speciale notis en la raporto de KRK, ke forestas ajna ricevo de mono el eksterlando.

Nikolao Gudskov: Eĉ tiam, kiam la spiona leĝo ne ekzistis, tutegale estis tiu punkto en la raportoj. Pri ricevo de mono el eksterlando.

Nikolao Gudskov: Interalie, nun mi enpensiĝas pri la afero, kiel ni tion organizu por SAT-kongreso. Ĉar estos diversaj aliĝkotizoj, antaŭpagoj kaj tiel plu. Kaj kiamaniere ni ilin ricevos, al kiuj kontoj kaj tiel plu... Se estus entrepreno, estus tute facile, sed Aleksej Salomatov ne plu havas entreprenon. Do, necesas pensi.

Gennadij Basov: Jena demando. Ĉu vi povas diri, kiomfoje ni ne pagis al UEA la kotizon kiel asocio? Kaj kiam ni tion povas fari? Ja devas esti iu sistemo, se ni ŝatas esti normala membro de UEA.

Aleksandro Lebedev: Ni regule pagas tiun kotizon al UEA, kaj REU estas tute normala aliĝinta asocio de UEA.

Gennadij Basov: Por mi ne estis klare, poste mi rigardos. Tio devas eniri en la buĝeton ĉiujare.

Nikolao Gudskov: Ĉiujare tiu pago estas.

Aleksandro Lebedev: En la financa raporto tiuj pagoj estas respegulitaj en la punkto «Eŭroj ĉe Svetlana Smetanina». Simple, dum tiu ĉi oficperiodo, por tiu asocia kotizo ni uzis la eŭrojn, kiuj estas konservataj ĉe Svetlana Smetanina. Tiun monon ni ricevis de Boris Kolker antaŭ kelkaj jaroj por eldono de lia libro.

Nikolao Gudskov: Jes, ĉi tie pagis por presi la libron rublojn el la kaso, kaj la eŭroj estis netuŝitaj.

Aleksandro Lebedev: Do, tiuj eŭroj estis uzitaj por pagoj al UEA. Nun la eŭroj preskaŭ finiĝis, do estonte la pagoj por la asocia membreco de REU okazos el la kaso.

Gennadij Basov: Necesas pensi kiel determini niajn membrokotizojn. Ĉar nun sumo de la individua kozizo, tiuj 250 rubloj, estas prenitaj de plafono.

Pasintjare mi havis penseton: ĉu ne estus bone forigi kluban membrecon? Sed nun mi vidas, ke per ĝi venas multe da mono, do eble nun forigi tiun kluban kotizadon estas ankoraŭ frue.

Mi finis.

1.6 Debatoj kaj pritaksoj

Aleksandro Lebedev: Necesas pritaksi la laboron de la Estraro kaj poste pritaksi la laboron de la Kontrol-revizia komisiono.

[Oni voĉdonas]

Voĉdonado Pritaksi la laboron de la Estraro en la raporta periodo. Kontentiga aŭ ne kontentiga?

«Kontengiga»: surloke 7, distance 4.

«Ne kontentiga»: 0, 0.

Decido: pritaksi la laboron de la Estraro en la raporta periodo kontentiga.

Voĉdonado Aprobi la laboron de la Kontrol-revizia komisiono en la raporta periodo kaj ĝian raporton?

Por: surloke 7, distance 4.

Kontraŭ: 0, 0.

Decido: Aprobi la laboron de Kontrol-revizia komisiono en la raporta periodo.

1.7 Raportoj de regionaj aktivuloj kaj kluboj

Volgia regiono

Jelena Kuznecova raportas pri Volgia regiono.

Jelena Kuznecova: Mi estas reprezentantino de Volgia regiono. Volgia regiono laŭ la disdivido ŝtata estas tre granda. De Kirova provinco ĝis... ĉu Saratova, ĉu Orenburga.

Certe, pro malbonaj kondiĉoj, pro la pandemio, laboro aliiĝis kaj preskaŭ haltiĝis. La laboro ne en la reto, sed viva. En la reto — male, la laboro aktiviĝis. En nia urbo Samara loĝas nevidanta esperantisto Vjaĉeslav Suslov. Li estas membro de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj. Dekomence, ĝuste en Samara oni proponis okazigi kongreson de nevidantoj [poste oni decidis tamen fari tiun kongreson en Moskvo]. Certe, en Moskvo estas pli oportune, sed tutegale ĝi ne okazis. Kaj Suslov gvidas en la reto kelkajn retejojn. Kaj li du aŭ tri fojojn en semajno gvidas retkunvenojn. Partoprenas ne nur nevidantoj, povas partopreni ĉiuj homoj. Partoprenas ne nur rusianoj. Ankaŭ eksterlandanoj venas el Germanio, Francio, Italio. Kion ili faras? Okazadas kursoj pri Esperanto. Okazadas kunvenoj, dediĉitaj al diversaj festoj. Al Zamenhofa tago, al Nova jaro kaj aliaj. Kaj la lasta kunveno estis dediĉita al la Tago de Esperanto, la 26-a de julio. Kaj ni kune partoprenis: homoj en interreto kaj membroj de nia samara klubo. Estis bonege, ni parolis preskaŭ ĉiuj. Estis la unua nia virtuala kluba kunveno.

Pri kluboj kaj regionoj. Mi scias, ke ekzistas kluboj en Volgogrado, certe en Samara, en Kazano, en Ĉeboksaro, en Uljanovska provinco. Ili ekzistas, sed tre malofte kunvenas.

Nikolao Gudskov: Antaŭhieraŭ al mi telefonis Valentina Spicina el Volgogrado kaj diris, ke ŝi sendis al mi iun artikolan raporton pri agado de la Volgograda klubo. Mi ne povas nun tralegi, sed jen — ili tie en Volgogrado aktivas, transdonas saluton.

Jelena Kuznecova: El ĉiuj listigitaj kluboj la plej aktiva klubo estas ĝuste tiu en Volgogrado. Ili ankaŭ kunvenas en la reto. Kaj ili multe verkas artikolojn, partoprenas en diversaj projektoj. Sed pro diversaj kialoj volgogradanoj ne partoprenas renkontiĝojn ekster sia regiono.

Mi deziras diri pri Sergej Abramov el Uljanovsk. Li gvidas paĝon en la socia reto «VKontakte», paĝon de Uljanovska klubo. Kaj preskaŭ ĉiutage li metas diversajn mesaĝojn. Li havas grandan entuziasmon, li laboras, kaj mi tre ĝojas pri tio. Ofte Jelena Polanskaja kopias tiujn materialojn al nia samara VK-paĝo.

Bedaŭrinde, nia samara klubo dum la pasinta jaro perdis kvar membrojn. Pro la viruso mortis nur unu, la aliaj — pro aliaj kialoj, pro la aĝo.

En aliaj urboj ekzistas apartaj esperantistoj. Eĉ al tiu ĉi aranĝo [RET en Dagestano] aliĝis Sergej Paĥomov, sed ne venis. Ekzistas esperantisoj en ĉiu granda urbo. En Saratov, Penza, Orenburg, Ufa.

En Niĵnij Novgorod estas Aleksandro Mitin, li povas rakonti pri la agado tie. Tie estas multaj esperantistoj, sed ili vivas sian vivon, partoprenas apartajn neesperantajn renkontiĝojn (VsPLESK, Ŝelest).

Nun pri renkontiĝoj...

Nikolao Gudskov arde skoldas Jelenan pri manko de raporto pri la okazinta renkontiĝo «Tempoj kaj urboj» en Penza.

Jelena Kuznecova: raporton mi sendos.

Nikolao Gudskov: Tio rilatas al ĉiuj. Kiam okazas iu renkontiĝo, bonvolu sendi raporton por la movada revuo «Ponto». Aliokaze neniu en Rusio ekscios pri via renkontiĝo.

Jelena Kuznecova: Do, pri renkontiĝoj. Ekde 2019 ĝis la nuna momento en Volgia regiono okazis tri renkontiĝoj. En 2019 okazis VER-16 en Samara. En 2020 okazis nenio. Ĉi-jare en majo okazis VER-17 en Dimitrovgrad. Partoprenis ĉirkaŭ 20 personoj. Venadis homoj el la urbo, kaj konatuloj, kaj preskaŭ nekonataj homoj. Unu junulo venis por ekscii pri Esperanto, kaj li estis tre impresita. En Dimitrovgrad nin gastigis Lera Ĥrustalova.

Kaj, same kiel ĉi tie en Dagestano ĉiuj konas Abduraĥman Junusov, tiel en Dimitrovgrad ĉiuj konas Aleksandr Ĥrustalov. Kiam ni venis al unu dimitrovgrada palaco, ili, aŭdinte pri Esperanto, diris: «Ho, Esperanto, bone! Ĉu vi bezonas ejon? Kiom da tempo vi bezonas? Ni metos vin en nian liston de aranĝoj». Kaj ni du vesperojn pasigis ne en la domo de Lera, sed en granda halo en tiu palaco. Tien venis urbanoj kaj aŭskultis pri Esperanto. Kaj poste ni dancis, ludis.

Kaj la tria renkontiĝo okazis en la urbo Penza en junio. Ĝi nomiĝis «Tempoj kaj urboj». Vi povos poste legi raporton. Partoprenis same 20 personoj.

Kio bona aperis en tiuj renkontiĝoj. Dum VER en Dimitrovgrado aperis nova esperantistino, tre bona. Kaj dum la renkontiĝo en Penza aperis junulo, li ekinteresiĝis pri Esperanto. Kaj en Penza kun ni estis loka esperantisto Leonid. Tre anima, tre kreema homo. Li verkas, tradukas, kantas. Li longe ne parolis kun esperantistoj vive pro tio, ke li lernis Esperanton en la 90-aj jaroj, kiam estis lernejano. Sed ni komencis paroli, kaj li komencis rememori vortojn. Kaj ni kune bonege parolis Esperante.

Ankoraŭ pri movado, pri aktivado. Verŝajne, ĉiuj konas Anatolij Ivanesov en Uzbekio. Li nun faras grandan libron pri historio de Esperanto en Uzbekio. Kaj en nia urbo Samara loĝas lia frato Vladimir Ionesov, li helpas. Vladimir Ionesov ankaŭ konstante reklamas Esperanton en sia instituto, kie li laboras. Krome, li artikolojn verkas.

Ni en Samara havis grandegajn planojn por estonto, sed, bedaŭrinde, la pandemia situacio malhelpas.

Mi nenion diris pri kursoj. Kursoj nenie en Volgio funkcias, aŭ mi ne scias pri tio.

Estas kursoj en Jaroslavl. Mi diru pri Jaroslavl, kvankam ĝi ne apartenas al la Volgia regiono. En Jaroslavl loĝas kaj laboras Svetlana Dudoleva. Do, Svetlana gvidas grupon. Mi preterveturis Jaroslavlon kaj mi renkontiĝis kun la homoj. Mi invitis ilin al iuj renkontiĝoj, ankaŭ ĉi tien. Sed ili ne sukcesis veni, bedaŭrinde. Tamen estas tre bonaj novaj esperantistoj.

Irina Gonĉarova: Mi ŝatus iom repliki pri la agado de Volgio. Mi ŝatus diri, ke fakte nun Volgio estas la plej aktiva regiono (por ne diri: la sola aktiva regiono). Kaj ni nepre devas laŭdi laboron de Lena. Mi partoprenis ŝian aranĝon, nome tiun VER-on en Dimitrovgrad. Ĝi estis ĉarme organizita, tre bone pripensita, kun bonega etoso. Kaj tie estis tri novaj junaj knabinoj, kiuj certe havis tre pozitivan impreson pri Esperanto dank' al tio, ke tio estis amika, etosuma, esperantparolanta renkontiĝo. Ĝuste tiaj aranĝoj tenas, allogas homojn, amikigas ilin, faras kolekitvojn. Kaj Lena estas grandioza bravulino, kiu faras ege bonajn programojn. Tiu ne estis senprograma aranĝo, sed ĝuste kun tre interesa por ĉiuj programo. Kaj, bedaŭrinde, mi ne povis partopreni nian preskaŭ komunan aranĝon «Tempoj kaj urboj» en Penza, kiun lanĉis «MASI», sed Lena surprenis tiun aranĝon. Oni diras, ke estis ege bona renkontiĝo, ĝuste pro tio, ke estis bona programo. Eĉ ne ĉion Lena sukcesis enmeti en tiun programon, tiom ĝi estis riĉa. Kaj oni multe parolis Esperante, multe praktikis Esperanton. Kaj tio kreskigas niajn gejunulojn, kiuj hazarde aŭ ne hazarde trafas tiujn renkontiĝojn. Kaj gejunuloj estas nia estonteco. Do, mi kaptas la okazon multe danki al Lena kaj deziras emfazi, ke tiel kiel laboras ŝi — mi ne vidas alian personon en la lando, kiu laboras tiom sukcese kaj multe. Do, Lenoĉka, vi estas bravulino, kaj persone mi vin multe dankas kaj alte aprezas vian laboron.

Kio rilatas raportojn — Nikolao absolute pravas, se ni ne raportas, neniu scias pri nia agado. Dankon al Aleksandro [Lebedev], ke li bone priskribis la dimitrovgradan renkontiĝon. Sed, bedaŭrinde, post la penza renkontiĝo tia homo ne troviĝis. Kaj la renkontiĝo ne estis prilumita. Bedaŭrinde. Ĉar tio estas perloj de nia historio de tiu ĉi jaro, kaj agado tiom malmultas, ke ni certe devas atenti tiajn aferojn.

Aleksandro Lebedev: Dankon. Kaj mi aliĝas al la vortoj de Mirina kaj proponas laŭdi la agadon de Lena. Ĉu ni laŭdu en la nomo de la Konferenco?

Voĉdonado

Por: surloke ĉiuj, krom Jelena Kuznecova, distance ĉiuj.

Kontraŭ: 0, 0.

Sin detenis: Jelena Kuznecova.

Decido: Laŭdi la agadon de Jelena Kuznecova dum la raporta periodo.

Dagestano

Abduraĥman Junusov raportas pri Dagestano.

Abduraĥman Junusov: Gesinjoroj! Se diri pri agado en Dagestano, do la plej grava por mi kaj multa parto de la laboro estas laboro por amaskomunikiloj.

Pli ofte redaktoroj demandas min pri Esperanto ol mi demandas ilin ĉu ili ion publikigos. Ekzemple, antaŭ la 16-a de julio al mi telefonis ĉefredaktoro de «Maĥaĉkalinskije izvestija» kaj diris: «Aĥman, ni urĝe bezonas intervjuon pri Esperanto». Kaj ili metis tutpaĝan intervjuon kun mi.

Kutime mi mem faras kaj demandojn, kaj respondojn. Ĉar ili povas erari, ili povas ion miskompreni. Mi donas al ili jam pretan intervjuon.

Mi ne iras al redakcio kun demando: ĉu ili publikigos artikolojn pri Esperanto, kiu estas lingvo de amikeco kaj tiel plu, kaj aliaj stultaĵoj. Mi uzas iun pretekston. Iu ajn evento, iu ajn gasto-esperantisto. Ekzemple, foje venis biciklisto el Svisujo, kiu faris kvar mil kilometrojn ĝis Dagestano per biciklo. Lin intervjuis ĉiuj dagestanaj gazetoj, tri televidaj kompanioj, unu el kiuj eĉ veturigis nin kun lia biciklo al Derbento por fari raportaĵon tie.

Antaŭnelonge estis vica konferenco en Teknika universitato pri «landoj, kulturoj, lingvoj». Kaj Ĉi-foje mi elektis temon «Filozofio de Esperanto». Oni laŭdis ĝin, kaj direktoro de granda moderna respublika biblioteko diris al mi: «Abduraĥman, se vi bezonas ejon por viaj kursoj, prelegoj, por io ajn, ni estas pretaj senpage doni al vi iun ajn bonan ejon de la biblioteko». Cetere, la samon proponis al mi la urba biblioteko. Ni ne havas problemon kie fari konferencon, kunvenon.

Krome, ĉi-jare mi faris kurson, kaj vi vidas niajn novajn esperantistojn, kiuj ankoraŭ ne havas sperton. Krom Lena Sepiĥanova, kiu partoprenis plurajn aranĝojn en diversaj landoj, ĉiuj ceteraj estas novuloj, kaj ili nun ĉi tie ricevas bonan sperton, ili jam havas imagon kio estas Esperanto-aranĝo.

Certe, estis malfacile fari tiun ĉi aranĝon. Unue, pro tio, ke estas malforta teamo, mi rekte diru. Kaj due, dum tri semajnoj ĝuste antaŭ RET mi tre forte malsanis, kaj mi nenion povis fari. Mi ne povis daŭrigi miajn vizitojn al la registaraj ministerioj kaj tiel plu. Tamen, ĝuste unu tagon antaŭ RET mi subite resaniĝis.

Mi supozas, ke en Dagestan ne ekzistas homoj, kiuj ne aŭdis la vorton «Esperanto». En Maĥaĉkala estas luksa restoracio sub la titolo «Esperanto». Ni vizitis, estas bona restoracio interalie. Ofte oni mem demandas min ion, eĉ sur strato: «Pardonu, vi ja okupiĝas pri Esperanto...» Mi diras: «De kie vi scias?» — «Nu, mi scias. Ĉu vi povas ion instrui?» Kaj, imagu: mi havis prelegon pri Esperanto kaj pri turismaj aferoj en RGUTIS (Rusia ŝtata universitato pri turismo kaj serviso). Rezulte, ili tre entuziasmiĝis, kaj unu ĉiĉeronino el Derbento demandis min: «Ĉu vi povus organizi novan kurson?» Kaj ĝuste pro tiuj ŝiaj vortoj mi faris la kurson, kiun finis Abutrab kaj Boris kaj la ceteraj, kiuj venis poste ĉi-tien. Mi renkontis dum la lasta ekskurso en Derbento iun virinon, kiu ankaŭ estas ĉiĉeronino. Ŝi diris: «Ho, estas Esperanto, nu jes, certe! Ankaŭ mi interesiĝas!».

Do, kion mi volas diri. Laŭ mi, en REU mankas laboro kun amaskomunikiloj. Mi havas impreson, ke nur en Dagestano gazetaro kaj televido interesiĝas pri Esperanto. Sed por tio oni devas labori kun ili. Oni devas proponi al ili interesajn temojn. Se vi nur unu-du fojojn mencios la vorton «Esperanto» en iu artikolo, ili jam tion kaptas. Oni devas amikiĝi kun redaktoroj. Por ke redaktoroj mem telefonu kaj demandu, ekzemple: «Kiamaniere vi intencas festi Zamenhof-tagon?». Aŭ la 26-an de julio.

Pro tio mi eĉ havas unu proponon. Mi legis en la «Materialoj...», ke iu povas sin proponi por iu komisiono. Eble, mi proponu min por la komisiono pri laboro kun amaskomunikiloj? Kaj mi iel pli vaste agos, ne nur en Dagestano, sed eble ankaŭ kun rusiaj amaskomunikiloj. Pri Esperanto, Esperanto-eventoj, Esperanto-faktoj kaj tiel plu. Tion ni povas pridiskuti.

Tre ofte oni invitas min prelegi pri Esperanto en Dagestanan ŝtatan universitaton, en Dagestanan teknikan universitaton, en gimnaziojn, en liceojn, en lernejojn. Estas granda intereso. Foje mi prelegis en la teknika universitano, kaj oni surprizigis min. Antaŭ mia prelego oni montris filmon pri Esperanto. Kaj ili trovis iujn materialojn kaj faris albumon pri Esperanto, montris al ĉiuj.

Do, en nia respubliko oni bone rilatas al Esperanto. Ekzemple, kiam mi riproĉis ministrinon pri kulturo, ke ŝi malmulte helpas al ni, ŝi diris: «Aĥman, senpagaj muzeoj en Maĥaĉkala kaj Derbento, ankoraŭ iu helpo, nur ni ne havas transporton por viaj ekskursoj, ni nenion povas diri.» Sed mi interkonsentis, ke

ili donacos al ni albumojn pri Dagestan, tre bone eldonitajn, ĉar mi petis tion por aktivuloj de la aranĝo kaj ĝenerale por premioj pri kvizoj kaj tiel plu.

Do, proksimume tiel.

Gennadij Basov: En la pasinta raporto de KRK mi menciis, ke ne estas aktiva agado ĝuste en tiu ĉi sfero. En la nuna raporto mi volis skribi, ke mankas ĝuste tiu laboro, sed ne volis ripeti la samon kiel en la pasinta raporto. Sed jen ĉi tie Aĥman tuŝis gravan demandon, ke ekstera agado, ekstera informado, propagando en REU lamas. Do, tion necesas iomete ŝanĝi. Pli da dinamiko doni, kaj mi eĉ diru, ke unu el prioritataj direktoj de la agado devas esti ĝuste ekstera agado. Ĉar oni ĉiam konsideras aŭ supozas, ke a) Esperanto jam mortis kaj b) esperantistoj estas kvazaŭ iu sekto. Tiuj mitoj aperas pro tio, ke mankas deca kaj digna informo.

Irina Gonĉarova: Mi kun grandega intereso, admiro kaj estimo aŭskultis la raporton de Aĥman. Mi ĉiam tion supozis, sciis, kaj tial mi pledis, ke RET okazu en Dagestano. Pro mia grandioza estimo al Aĥman, kiu neniam lasis sian laboron dum la tuta sia vivo. Kaj, denove, sola manko estas ke ni nenion scias pri tio. Se Aĥman post ĉiu tiu evento rakontus almenaŭ kelkfraze, ke li vizitis tion kaj tion, prelegis tie kaj tie, tiam ni havus iun konkretan bildon. Mi scias tion teorie, sed ni ne havas, sur kio nin apogi konkrete. Do, Aĥman, vi estas ĵurnalisto, vi devas tion bone kompreni. Kial vi raportas tiom malmulte al ni? Estas retorika demando. Simple mi deziras multege laŭdi vin, kaj mi ŝatus danki al Aĥman pro la elstara informagado en la nomo de la Konferenco. Mi certas, ke tiu agado neniam ĉesas. Kaj mi traktas ege grava, ke Aĥman proponas sin kiel kunordiganto aŭ konsilanto pri laboro kun amaskomunikiloj.

Kaj krome, el la parolo de Aĥman mi vidas, ke li absolute ne scias, ke enkadre de REU ekzistas speciala labordirekto, kiu nomiĝas «Informa agado». Tiun labordirekton proponis mi antaŭ du jaroj dum la antaŭa, 30-a Konferenco. Kaj mi opinias ĝuste tiun eksteran informan agadon bazo de nia nuna laboro en Rusio. Popularigo estas nun ege grava afero. Kaj tial mi proponis min kiel gvidanton de tiu direkto. Ke tion ne scias Aĥman, min ne mirigas tute. Sed, ke tion ne scias Gennadij Basov, kiu estas revizianto... Tio estas granda miro, ke Basov nun pledas pro tio, kion ni jam prisuĉis antaŭ du jaroj, pri kio jam estas labordirekto, kiu nomiĝas «Informa agado»... Do, tio estas iom mirinda.

Do, permesu al mi diri pri tiu direkto. En la Estraro ĝuste pri ĝi mi okupiĝis. Kaj 50-procente pri instruado (tiun branĉon mi disdividis kun Svetlana Smetanina).

Do, pri informa agado. La unuan jaron mi vere multe klopodis por ĝi. Unu el momentoj estis kreo de la grupo en VK, kiu nomiĝas «Informu!» [`https://vk.com/informado`]. Estis ankaŭ en Fejsbuko. Mi multe penis disciplinigi homojn, ke ne temas pri tio, kion vi faris en Esperanto. Tian informon donu al la movada revuo «Ponto». Sed ĉi tie temas nur pri kion vi faris por ekstera publiko, por informi eksterulojn pri Esperanto.

Enkadre de tiu ĉi laboro estis lanĉita la projekto «Unu leciono pri Esperanto por gelernantoj», kiun ni faris kun grandioza sukceso, unika en la mondo. Ni venadis al lernejoj kaj donis unu lecionon pri Esperanto al lernejanoj. Pri tio estis detalega raporto, estis tre sukcesa laboro.

Rilate al tiu laboro mi denove diras al Aĥman, ke ankaŭ en Moskvo ni mem ne turnas nin al amaskomunikiloj. Sed foje oni interesiĝas pri ni. Kaj foje mi havis ege grandan intervjuon por la virtuala revuo «Mel» [«Kreto»], kiu estas multe legata de instruistoj, instruantoj kaj gepatroj. Tio estas porlerneja amaskomunikilo. Mi ne dirus, ke la intervjuo estis tre bona, sed ĝi estis sufiĉe ampleksa kaj ne tro da fuŝoj enhavis. Vidu, ĝin legis miloj da homoj. Kaj homoj ne nur legis, sed reagis en la komentoj kaj tiel plu. Tio estas vera popularigo.

La agado rilate al ekstera informado dum la unua postkonferenca jaro estis tre aktiva kaj, laŭ mi, tre sukcesa. Kaj homoj en tiu nia grupo «Informu!» poiomete komencis publikigi ĝuste raportojn pri tio, kion ili faris por ekstera agado. Ekzemple, moskvaj junuloj en la Zamenhof-tago venis al Ruĝa placo kun verda standardo, vokis intereson de polico kaj tiel plu. Tio estis pasintjare. Ĉi-jare ili en interurbaj trajnoj vagis kun laŭta kantado en Esperanto. Homoj venadis al ili kaj demandadis, kio estas tiu stranga kantado. Do, gejunuloj mem elpensas siajn aktivadojn kaj serĉas rimedojn popularigi, tio estas tre interesa.

Do, mi aktivis la unuan jaron de mia oficperiodo, sed tute ne aktivis la duan jaron. Tiu agado ne ĉesis, sed, bedaŭrinde, ĉesis raportado pri ĝi. Mi tute ne raportas, la agado multe ŝrumpis, ĉar mi ne gvidas kaj ne organizas. Tamen, io estas, kaj eble, se mi iam decidos reveni al pli aktiva stato ene de

Esperanto-movado, eble mi revigligos tiun tre utilan grupon «Informu!».

Abduraĥman Junusov: Vidu, fine de la 80-aj aŭ komence de la 90-aj ni havis grandan kaŭkazian Esperanto-renkontiĝon. Maje dum manifestacio ni iris en aparta kolono kun verdaj standardoj. Estas tempoj, kiam komenciĝis islamigado de la regiono. Do iuj homoj diris: «Ho, islamistoj venis al la manifestacio!».

[Oni ridas]

Irina Gonĉarova: Do, la lasta afero. Ĉar en REU mi respondecas pri informado en tiu ĉi oficperiodo, mi proponas en la nomo de la Konferenco danki al Aĥman pro la elstara informagado.

Voĉdonado

Por: ĉiuj.

Decido: Danki al Abduraĥman Junusov pro la elstara informagado.

Demando pri la REU-reprezentantoj

Vladimir Minin: Mi volas demandi. Irina Gonĉarova diris, ke Vladimir Sapoĵnikov ne plu estas reprezentanto de REU en Siberio. Kaj poste ŝi diris, ke Alla Jaĥina estas siberia reprezentanto. Ĉu la Estraro konfirmas, ke Alla Jaĥina estas reprezentanto?

Irina Gonĉarova: Mi laboris kun siberianoj. Vladimir Sapoĵnikov ne plu estas reprezentanto de Siberio ekde la pasinta konferenco. Mi traktis kun Alla Jaĥina, kiu komence konsentis esti, poste dum jaro silentis, ne respondis miajn demandojn kaj finfine skribis al mi, ke ŝi vane konsentis fari tiun laboron, kaj ŝi tute ne pretas.

Ekde tiam Siberio restas sen reprezentanto de REU, same kiel preskaŭ ĉiuj federaciaj regionoj de nia lando. Nun ni havas Aĥman, kiu estas reprezentanto por Sudo, kaj havas Jelena Kuznecova, kiu estas reprezentanto por Volgio. Nun ni vidas, ke Volgio estas la sola regiono, kiu laboras kaj montras rezultojn. En la Centra regiono neniam estis reprezentanto kaj nun ne estas. En Nordo estas sufiĉe simpatia homo, kiu tute ne kapablas kontakti aliajn nordanojn (ekzemple el Tiĥvin kaj el Sankt-Peterburgo). Kaj malgraŭ ke en Tiĥvin kaj en SPb certe estas agado, ni neniam pri ĝi scias, ĉar la reprezentanto ne raportas. En Fora Oriento estis Eŭgeno Bojĉin, sed li rifuzis resti reprezentanto. Do, ni havas reprezentitaj nur du regionojn.

Jelena Kuznecova: Kaj Ural-Siberio?

Irina Gonĉarova: Nu, en Siberio estis ĝuste Vladimir Sapoĵnikov. En Uralo estas Pavel Veselov, sed mi ne dirus, ke li ion raportadas. Uralon eblas sekvi en la reto, ĉar ili estas unuj el nemultaj, kiuj havas retan agadon en la senco de elektronikaj aktivadoj en sociaj retoj kaj en dissendolisto. Tiusence ili estas bravuloj dank' al Raja Kudrjavceva. Sed aliaj ne. Do jen la situacio.

Do, al Vladimir Minin mi respondas. Nun Siberio ne havas reprezentanton. Kaj elekto de la reprezentanto estas afero de la regiono, sed ne de la Estraro. Ni povas peti homon, proponi al homo, sed ni ne povas sen decido de la regiono nomumi iun reprezentanton.

Demando pri apartiĝo de uralanoj

Aleksandro Mitin: Irina, mi havas ĉu demandon, ĉu komenton pri uralanoj. Ili estas veraj bravuloj, jes. Mi vidis, ke ili havas siajn apartajn renkontiĝojn en la reto, kio estas bona, laŭ mi necesas iri al interreto. Sed mi havas nur unu komenton-demandon: kial sen ni? Ili vizitis niajn unuajn retajn kunvenojn, sed poste ili iom apartiĝis. Kaj mi iomete timas la situacion.

Irina Gonĉarova: Mi nenion povas diri pri tio. Sed kio estas malbona, se homoj havas siajn renkontiĝojn? Malbonas, ke ili ne partoprenas la komunajn.

Aleksandro Mitin: Jes!!!

[La unua kunveno de la Konferenco finiĝas je la 13:00.]

2 La dua kunveno, la 21-an de aŭgusto, post tagmanĝo

[La tempo estas: 14:10.]

Raportoj de regionaj aktivuloj kaj kluboj (daŭriĝo)

Tomsko

Vladimir Minin raportas pri Tomsko.

Vladimir Minin: En februaro de la 2020-a jaro esperantistoj tomskaj renkontiĝis, kaj poste laboris nur kelkaj sekcioj. Ekzemple, sekcio de preferanso, sekcio de granda teniso.

Kaj plej multe laboras sekcio de tradukado. Ni jam tradukis duonon de libro de sinjoro Udo Ulfkrotte «Aĉetitaj ĵurnalistoj» el la germana en la rusan. Mi havas parton de tiu libro ĉi tie, kaj, se iuj volas konatiĝi, ili povas konatiĝi.

Kaj ĝuste antaŭ mia forveturo al la Altaja regiono ni finis traduki novan kinofilmon el la germana al la rusa. Kaj mi skribis al rusia-esperanto-agado@googlegroups.com, ke mi povus alveturigi memorbastoneton kun tiu ĉi filmo al tiu ĉi aranĝo «RET», sed ial mia letero ne aperis en «Rusia Esperanto-agado», verŝajne, ĉar REU ne interesiĝas pri tiu filmo.

[Sekvas palavroj pri moderigado de la dissendolisto kaj pri (mal)akcepto de proponoj al la programo de la aranĝo.
Interalie, kiel poste estis kontrolite, iu mesaĝo de Vladimir Minin pri kinofilmo kaj memorbastoneto en la dissendolisto aperis (la 3-an de aŭgusto).]

Vladimir Minin: Jen, pri agado de la Minska Esperanto-klubo mi finis.

Gennadij Basov: Mi havas demandon. Kiun rilaton havas granda teniso kaj preferanco al evoluigo de Esperanto?

Vladimir Minin: Ĉar tiel esperantistoj donas gravajn servojn.

Aleksandro Lebedev: Tio estas tiel nomata faka agado. Ekzemple, en Eŭropo aktivas esperantistoj-biciklistoj.

Nikolao Gudskov: Kaj Perevertajlo siatempe senreviĝis pri Esperanto, ĉar esperantistoj ne sukcesis esperantigi Olimpikajn ludojn.

Vladimir Minin: Tomskaj esperantistoj tradukis multajn kinofilmojn el la rusa, el la germana al Esperanto. Kiu interesiĝas, tiu povas skribi al la prezidanto [de la Tomska Esperanto-klubo] Konstantin Obrazcov.

Gennadij Basov: Mi ŝatus aldoni, ke kiam mi demandis Konstantin Obrazcov: «Ĉu Tomska Esperanto-klubo volas esti kolektiva membro de REU?», li rezolute diris «Ne, neniuokaze.»

Tio estas interesa vidpunkto. Mi ĝis nun ne multe komprenas, kial li tiel kategorie neas. Pro tio eble tiuj informoj pri la agado de Tomska klubo ne estas konataj al REU.

Alia afero. Aperis antaŭ kelkaj jaroj interesa iniciato fari «Novojarskon». Estas jarŝanĝa aranĝo. Jam en kelkaj urboj ĝi okazis. Kaj, sincere dirante, mi ne scias rilaton al REU de organizantoj de tiu aranĝo. Ĉu estas ĝi sendependa aranĝo? Aŭ estas iel ligita?

Aleksandro Lebedev: «Novojarsk» estas sendependa aranĝo.

Nikolao Gudskov: Sed kun subteno [de REU].

Gennadij Basov: Mi ne komprenas tiun sendependecon! Ni, kiel mi supozas, devas aktivi en unu direkto. Sed kiam komenciĝas tiuj splitiĝoj, kiel iuj «RA» [«Renkontiĝo de amikoj»], io, kio havas neniun rilaton al REU, tio estas simple mirinda afero.

Nikolao Gudskov: Subteno de REU al tiuj aranĝoj estas. Al Novojarsko — sendube, eĉ estis mona subteno. En tiu senco ili estas en kunagado kun la landa organizo, tute normale. Loka iniciato kun kunagado estas la plej bona maniero, ĝenerale.

Gennadij Basov: Sed ili ne kunagadas. Ili uzas subtenon de REU, sed mem ne subtenas REU [almenaŭ per sia aliĝo].

Nikolao Gudskov: Diverse. Kun Krasnojarska klubo ne estis iuj problemoj, Krasnojarska klubo membras.

Aleksandro Lebedev: Kaj Barnaula klubo aliĝis. [Ankaŭ Novosibirska klubo membras, intercetere. El la kluboj, iam organizintaj «Novojarskojn» ne membras en REU nur la Tomska klubo.]

Gennadij Basov: Kaj la Tomska rezolute diras: ne.

Nikolao Gudskov: Kaj subteno al Arbekova certe estas, ĉar en la landa dissendolisto kaj en la revuoj ĉiam estas reklamo de ŝiaj aranĝoj.

Vladimir Minin: Konstantin Obrazcov estas ankaŭ kontraŭ UEA.

Gennadij Basov: Estas io stranga. Mi speciale atentigas pri tio ĉi por ke le estonta Estraro almenaŭ pensu pri tio. Ĉar estas multaj sendependaj esperantistoj tiel nomataj. Ili lernis Esperanton por propraj celoj, iuj simple ne scias, ke ekzistas REU. Ilin necesas iamaniere aktivigi, trovi vojon al ili. Aŭ ili trovu vojon al REU.

Aleksandro Lebedev: Estas homoj, kiujn estas simple senespere engaĝi en REU. Por kio do persvadi ilin? Ili agadu aparte.

Gennadij Basov: Necesas tamen iel klarigi al tiuj homoj, ke kunagadi en landa skalo estas utile.

Nikolao Gudskov: Almenaŭ kaj unuavice kunagadi per sendado de informoj pri sia agado.

Vladimir Minin: Mi ĉiam informas en mia dissendolisto. [Sekvas reklamo de la fama dissendolisto de Vladimir Minin].

Propono krei ILEI-sekcion

Jelena Nadikova: Mi rakontu ne pri Ĉeboksaro, ĉar tie ne estas jam aktiva Esperanto-agado, almenaŭ laŭ mia scio. Mi rakontu pri alia problemo.

Vi scias, ke mi estas sekretario de ILEI. Antaŭ kelkaj jaroj nia prezidanto skribis oficialan peton al UNESKO por ĝi agnosku ILEI-n kiel mondan neregistaran organizon. En tiu afero ni nun atendas respondon. Tio daŭros longe. Sed por tiu celo (ke ILEI estu agnoskita) necesas, ke estu pli da landaj sekcioj. Mi ekvidis, ke Rusio ne havas nun ILEI-sekcion. Do, antaŭ du jaroj mi sendis mesaĝon al ĉiuj ILEI-membroj en Rusio, estis tiam 6 membroj: «Ĉu ni fondu ILEI-sekcion en Rusio? Kial ni ne havas la sekcion?». La respondo estis tute neatendita. La tiama reprezentanto de ILEI en Rusio Svetlana Smetanina skribis: «Rusio ne bezonas ILEI-sekcion». Tiu respondo estis tute neatendita por mi.

Jelena Nadikova: Fakte, mi scias, ke en REU estas laborgrupo pri instruado de Esperanto en Rusio.

Aleksandro Lebedev: Vladimir Opletajev aktivis en tiu kampo.

Jelena Nadikova: Mi proponas, ke instruado estu unu el branĉoj de agado ene de REU. Tamen, mi denove proponas revivigon de la sekcio de ILEI kaj proponas agadi kune. Ĉar mi pretas kunlabori kun REU flanke de ILEI. Fakte, por mi estis vera ŝoko, kiam mi ricevis tiun respondon «Rusio ne bezonas ILEI-sekcion». Kaj mi tre volus, ke en REU ne estu tiuj rilatoj, ĉar tio bremsas la progreson.

Aleksandro Lebedev: Eble, vi mem okupu tiun postenon de la reprezentanto de ILEI en Rusio.

Jelena Nadikova: Vidu, mi jam estas sekretario de ILEI, kaj mi estas vicdirektorino de grandega lernejo. Mi tre ŝatus, sed mi fizike ne sukcesos. Ni havas multajn meritajn Esperanto-instruistojn, kiuj povus esti ILEI-sekciestro. Fakte, mi proponus al Smetanina mem esti sekciestro, sed...

Aleksandro Lebedev: Necesas, ke iu konsentu esti sekciestro, kaj tiu iu okupiĝu pri kreo de la sekcio.

Nikolao Gudskov: Iam, eĉ ne unufoje, sed dufoje oni havis en Rusio tiun ILEI-sekcion. Kaj ĝi bone forpasis. Tio signifas, ke eĉ en tiuj tempoj, kiam instruado estis pli aktiva, la instruistoj en Rusio ne tre bezonis la sekcion.

Irina Gonĉarova: Mi rakontu la historion de mia vidpunkto. Mi kun Lena vere multe laboris por krei tiun ILEI-sekcion, kaj de mia flanko mi, laŭ mi, sufiĉe multon faris. Sed, Lena, mi ne ŝatus tion diri, sed mi devas — ĝuste vi ne respondadas leterojn miajn. Multajn. Kaj la agado ĉesis ne pro tio, ke iu volas aŭ ne volas. Sed pro tio, ke vi ne respondadis. Vi ne kunlaboris. Kaj kiam vi diras, ke vi helpos, vi faros... — ne! Vi nek helpos, nek faros. Pro via okupateco. Mi, bedaŭrinde, tion spertis. Mi tute ne deziras vi riproĉi. Mi ne imagas, kiel vi spiras pro via vere terura okupateco kiel direktoro de granda lernejo kaj kiel ILEI-sekretariino. Sed helpo de vi ne estas. Kaj sen viaj konsiloj kaj helpoj tiu agado por restarigi ILEI-sekcion — por kio mi faris sufiĉe multe, traktante kun novaj homoj, kiuj pretis aliĝi — sen vi tio ne funkciis. Tio estas miaj impresoj kaj rememoroj.

Alia momento. Vi havas iun strangan imagon pri granda instrua aktivado en nia lando. Ni havas erojn, eretojn da instrua laboro en nia lando! Certe estas bone scii almenaŭ pri tio, kio ekzistas. Sed lasu vian ilusion, ke ni estas unu el plej! Nenio simila! Instruado en la lando ŝrumpas tute same kiel ŝrumpas aliaj branĉoj de la movado. Ne multas homoj, kiuj povas, emas, kaj des pli reale ion faras. Estas unuopuloj. Do, lasu la iluzion, ke en Rusio estas forta instruado kaj multaj instruistoj.

Mi finu per tio, ke mi estas «por» ILEI-sekcio. Sed, Lena, vi ne helpas kaj ne helpos. Tio estas iluzio, vi ne havas fizikajn eblojn.

Jelena Nadikova: Dankon pro la respondo, ankaŭ mi respondos. Mi ne havas iluziojn pri granda instruado en Rusio, mi tion mem esploris.

Mi ne dirus, ke mi ne helpos. Bonvolu ne diri, ke mi ne helpos ĝenerale. Sed mi fizike ne kapablas ĉion sukcesi, pro tio mi proponas, ke iu alia estu sekciestro.

Krome. Kiel mi komprenis el la vortoj de Nikolao kaj nun el viaj vortoj, vi imagas tiun sekcion kiel idealan sekcion kun tre bone starigita metodika laboro kaj tiel plu. Sed, kiel diras rusa proverbo, Moskvon oni ne tuj konstruis. Se ni starigos grandajn celojn dekomence, ni nenion atingos. Ni devas komenci de malgrandaj paŝoj. Kaj la ĉefa kialo, pro kio mi insistas pri la restarigo de la sekcio, estas ĝenerala prestiĝo de ILEI kiel tutmonda organizo. Ju pli multe da sekcioj ekzistas, des pli rapide UNESKO agnoskos ILEI-n.

Pro tio mi proponas ne konstrui aerajn kastelojn, sed komenci per malgrandaj paŝoj.

Aleksandro Lebedev: Do, almenaŭ surpapere krei la sekcion.

Jelena Nadikova: Kial surpapere?

Aleksandro Lebedev: Mi komprenis ĝuste tiel el viaj vortoj.

Nikolao Gudskov: Proponu, kiu ekgvidu la aferon.

Jelena Nadikova: Smetanina, kiel reprezentanto de ILEI, tute nature estus...

Nikolao Gudskov: Smetanina nun havas grandajn aliajn okupojn kaj ne interesiĝas pri ILEI. Kial do vi ŝin proponas?

Jelena Nadikova: Se ne estos alia homo, do por tiu celo pri la agnosko ĉe UNESKO mi pretas esti la gvidanto. Almenaŭ, komence, surpapere fari.

MEA «MASI»

Irina Gonĉarova rakontas pri la agado de MEA «MASI».

Irina Gonĉarova: Estis bone dirite pri REU, ke REU estas membroj, kaj se membroj agas, tiam la organizaĵo ekzistas. Same mi povas diri pri la lasta tre malfacila kovida jaro de «MASI». Ne estis, ne povis okazi iuj komunaj aranĝoj. Ekzemple, estis la unua fojo, kiam ni preterlasis APERon. Kvankam en la 2020-a ni sukcesis okazigi ĝin, ĝi okazis en februaro, kaj marte komenciĝis la kvaranteno. Sed en la 2021-a jaro ni jam ne povis tion fari kaj preterlasis. Tamen, anstataŭ ĝi mi pensis pri Penza, sed post traktado kun Jelena Kuznecova ni decidis, ke tio estu ne «MASI»-aranĝo, sed volgia aranĝo aŭ komuna aranĝo. Kaj poste en junio ĝi okazis. Kaj mi mem kun kelkaj iris maje al VER en Dimitrovgradon.

Do, pri agado de unuopuloj. Denove mi emfazas informan agadon. Informa agado estas multe pli vasta nocio, ol laboro kun amaskomunikiloj. Mi ŝatus, ke ni tion komprenu. Pri amaskomunikiloj ne tiom multaj homoj lertas AĤman-nivele. Sed amaskomunikiloj estas nur parto de ĝenerala informa agado. Kaj informa agado estas tiu kampo, kie multaj esperantistoj vere povas labori. Tio estas ne nur publikaĵoj. Tio ankaŭ estas, ekzemple, lingvaj festivaloj. En la pasintaj du jaroj okazis kelkaj lingvaj festivaloj. Unu el ili estis lanĉita en Ukrainio de masianino. Kaj tie certe estis prezentita Esperanto. Ni partoprenis lingvan festivalon en Kaluga. Kaj tie, kompreneble, estis prezentita Esperanto. Okazis aŭtune 2020 la 15-a granda Moskva lingva festivalo. Kompreneble, tie estis multo pri Esperanto. Ĉio tio estas informa agado.

Krome, mi volas diri unu iam surprizan por mi frazon de Vladimir Soroka, kiun li diris pri mia filino. Kiam mi grumblis, ke ŝi ne estas movadanino, kvankam denaske parolas Esperanton, li diris: «Ne gravas. Per sia ekzisto kiel esperantisto ŝi jam popularigas Esperanton». Ankaŭ tio estas niaj plusoj. Se homoj

hazarde ekscias, ke unu simpatia agrabla homo de certa komunumo estas esperantisto — ankaŭ tio estas popularigo de Esperanto.

Ni devas konsideri ĉiujn revelaciojn de Esperanto. Ankaŭ ke homoj simple parolas Esperanton. Ni devas estimi ĉiujn! Kaj Esperanto-parolantojn, kaj Esperanto-etosumantojn, kaj Esperanto-gejunulojn, kiuj entreprenas ion laŭ sia deziro.

Do, popularigo de Esperanto certe okazas ankaŭ dum Esperanto-renkontiĝoj. En Dimitrovgrad tio funkciis bone kun tri knabinoj, kiuj venis. Kaj unu el ili estas tiom motivita, ke de majo ĝis hodiaŭa tago mi konstante kun ŝi kontaktas, ŝi gastas en Moskvo kaj tiel plu. Ŝi jam tute bone senerare minimume korespondas, se ne flue parolas. Do, dum du-tri monatoj, kaptinte entuziasmon dum Esperanto-renkontiĝo sufiĉe etosuma, ŝi iĝas Esperantisto. Kaj ŝi iĝos. Do, popularigo estas nia ege grava afero.

Alia afero estas partopreno de masianoj en virtualaj kongresoj. Mi ne parolas pri ĉiuj rusiaj esperantistoj, kiuj en tiuj forumoj aktivas, sed mi volas nepre emfazi laboron de Oĉjo Ĉajka, kiu gvidas sekciojn, organizas forumojn, gvidas literaturajn kaj aliajn metiejojn, estas tre aktiva en aranĝoj de «E@I» kaj en multaj aliaj. Tiaj homoj estas valoraj. Ili kontribuas al tutmonda Esperanto-agado.

Ni devas konsideri ankaŭ klerigon. La fakto, ke du masianoj finas nun kun perfektaj notoj la Interlingvistikajn Studojn de Ilona Kotni, ankaŭ tio estas tre granda valoro kaj pluso. Tio estas nivelo de nia Esperanto-kulturo en Rusio. Ili estas perfekte kleraj esperantistoj. Alia afero: ĉu nia esperantista enlanda movado liveros al ili spacojn por sin esprimi? Ĉu montros intereson al ili pri ilia kleriga agado?

Do, mi observas nun laboron de masianoj, kaj vidas, ke unuopuloj tre multon faras.

Ankaŭ mi mian modestan kopekon enmetas en «MASI»-agadon. Tio estas ĉeesta kaj virtuala instruado de Esperanto al infanoj. Mi jam partoprenis tri infanajn tendarojn, kie mi ĉiufoje instruis Esperanton al deko da geknaboj. Kaj nun mi instruas al infanoj ankaŭ virtuale.

Tatjana Loskutova: Ĉu mi rajtas aldoni du vortojn pri informa agado? Mi havis okazon esti en Groznij antaŭ ol veni ĉi tien. Kaj mi hazarde trafis kunvenon de anglaparolantoj. Kaj, parolante pri ilia laboro, mi menciis Esperanton. Do, mi sciigis pri la lingvo al 20 personoj proksimume. Kaj al du gvidantoj de la angla klubo mi dum du horoj parolis pri Esperanto.

Irina Gonĉarova: Bonege! Ĝuste kion ni bezonas.

2.1 Elektoj

[La tempo estas: 15:00.]

Aleksandro Lebedev: Ni elektu komence Prezidanton, poste Vicprezidanton kaj Estraron. Ĉu estas proponoj aŭ sinproponoj por la posteno de Prezidanto?

Nikolao Gudskov: Estas unu propono alternativa. Pro la eksterordinara situacio en la lasta periodo, pandemio, longa neeblo renkontiĝi kaj tiel plu, multaj aferoj, kiujn povis la antaŭa Estraro fari, ne estis faritaj aŭ finfaritaj. Do, ekzistas simpla propono, ke la tuta konsisto de la Estraro funkciu ankoraŭ plian jaron aŭ plian periodon.

Vladimir Minin: Ĉu post la jaro denove okazigi la Konferencon?

Nikolao Gudskov: Bone, ĝis la sekva Konferenco post du jaroj. Do por du jaroj.

Gennadij Basov: La propono estas bona, sed komence necesas demandi la estantajn REU-estraranojn pri ilia konsisto.

Aleksandro Lebedev: Laŭ mi, la propono estas iomete kontraŭstatuta. Ĉar se okazas Konferenco, ĝi aŭtomate elektas Prezidanton kaj Estraron. Ni povas elekti la samajn, tamen necesas okazigi balotadon.

Irina Gonĉarova: Mi akceptus proponon de Nikolao, tamen mi opinias, ke necesas konsideri la sinproponon de Aĥman [eniri la Estraron].

Aleksandro Lebedev: Jes, Aĥman proponis sin kiel respondeculon pri amaskomunikiloj.

Abduraĥman Junusov: Sed mi ne proponis min kiel Prezidanton!

Nikolao Gudskov: Eĉ se ne okazus Konferenco, la Estraro rajtus koopti unu personon.

Gennadij Basov: Antaŭ ĉiuj balotadoj mi ŝatus diri, ke Sergeo Ĵilejkin petis, ke oni ne elektu lin [en Kontrol-revizian komisionon]. Do, se estos bezonata tria persono en la Kontrol-revizia komisiono, necesas pensi. Mi pretas resti en la sama posteno [de la prezidanto de KRK], pri Larisa ŝi mem diros.

Larisa Ŝapoŝnikova: Ankaŭ mi pretas [resti en KRK].

Nikolao Gudskov: Ankoraŭ ne respondis Saŝa Mitin.

Aleksandro Lebedev: Mi lin demandis en VK. Li diris, ke li konsentas resti en la Estraro.

Aleksandro Mitin: Mi ĉi-tias, mi povas ion diri. Fakte, ni ne scias, ĉu tiu kronvirusa paŭzo estas reala paŭzo aŭ simple nova realeco.

Aleksandro Lebedev: Jes. Do, mi proponas tamen fari balotadon laŭ la Statuto.

Nikolao Gudskov: Laŭ la Statuto ni povas tion fari, ni povas fari ion ajn, eĉ ŝanĝi la Statuton. Temas pri tio, ke la proceduro estos pli facila, se ni simple daŭrigos funkciadon de la nuna Estraro. Kaj se ni faros plenan proceduron, denove elektos novan Prezidanton, ni devos sekrete voĉdoni kaj nepre sur la alternativa bazo.

Abduraĥman Junusov: Do estu vi alternativo. Vi estas spertulo konata en Sovetunio, Rusio, Eŭropo.

Aleksandro Lebedev: Ankaŭ vi, Aĥman povas.

Aleksandro Lebedev: Do, ĉu estas proponoj/sinproponoj por la posteno?

Irina Gonĉarova: Jelena Kuznecova estu alternativo!

Jelena Kuznecova: Nur se teknika kandidato...

Aleksandro Lebedev: Tio estas danĝera afero, ankaŭ mi pasintfoje konsentis esti teknika kandidato. [Oni ridas.]

Nikolao Gudskov: Bedaŭrinde forestas Seguru, deĵora teknika kandidato...

[Oni daŭre palavras pri alternativaj kandidatoj]

Valentin Melnikov: Tamen, ĉu decidis fari plenan proceduron kun alternativoj kaj tiel plu? Kial ne akcepteblas propono de Nikolao simple prokrasti tion ĝis la sekva fojo?

Nikolao Gudskov: Mi nun petas simple voĉdonigi tiun proponon.

Aleksandro Lebedev: La proponon pri daŭrigo de la nuna Estraro, ĉu?

Aleksandro Lebedev: Tamen poste ni voĉdonu ankaŭ pri Aĥman.

Voĉdonado Propono de Nikolao Gudskov pri daŭrigo de la funkciado de la Estraro de REU.

Por: surloke 11, distance 4.

Kontraŭ (fari ĉion laŭ kutima proceduro): surloke 0, distance 1.

Sin detenis: surloke 1, distance 0.

Decido: Daŭrigi la funkciadon de la Estraro de REU en plena konsisto.

Aleksandro Mitin: Pardonu, do, por kiu tempo? Ĉu por unu jaro?

Nikolao Gudskov: Por la sekva Konferenco.

Aleksandro Lebedev: Por du jaroj, verŝajne, ĉar sekvajare apenaŭ okazos la Konferenco. Estos SAT-kongreso, IKBE-kongreso...

Aleksandro Mitin: Sed mi ne vidas, kio malhelpas fari la Konferencon iam ajn per interreto? Kial fari tiun ĉi rondon?

Nikolao Gudskov: Ekzistas homoj, kiuj ne tre bone uzas komputilon. Ekzemple, ĉi tie la estraranoj estas nur kvarope, ĉar la kvina estrarano hezitas dum uzado de Zoom.

Valentin Melnikov: Estas tute normala situacio. Se homo volas iel agi, do en nuna epoko almenaŭ minimume komputilon uzi necesas.

Aleksandro Lebedev: Mi konsentas kun Valentin: ni ja ne devas tiel orientiĝi je 20 procentoj da homoj kaj bremsi.

Sergej Bronov: Necesas Esperanton scii kaj ĉio.

Valentin Melnikov: Temas pri tio, ke oni mem trovu pli oportunan por si rimedon por partopreni la aranĝon. Kiamaniere — tio estas elekto de la persono mem. Gravas, ke li aŭ ŝi povu partopreni.

Aleksandro Mitin: Fakte, ja viziti ion estas pli malfacile ol trovi la tempon por partopreni distance.

Valentin Melnikov: Iu, kiu ne spertas pri komputilo, havu komputilspertan amikon, kiu povu helpi.

Abduraĥman Junusov: Gesinjoroj, geamikoj, samideanoj, ĉu ni elektos hodiaŭ ankaŭ komitatanon A por UEA?

Aleksandro Lebedev: Ne, ĉar antaŭ du jaroj estis elektita Svetlana, kaj tie la mandato daŭras tri jarojn. Do, ŝia komitataneco validas ankoraŭ unu jaron.

Abduraĥman Junusov: Mi demandas, ĉar mi supozas, ke tiu ĉi RET estas por ni provludo por fari grandan internacian aranĝon. Kaj, se mi tiun komencos organizi, al mi tre helpus paroli kun nia registaro tiustate, ke mi estus reprezentanto de UEA.

Irina Gonĉarova: Post jaro vi ricevu.

Abduraĥman Junusov: Kaj tiam mi povus paroli kun la registaro de pozicio de forto, mi konas ilian pensmanieron.

Aleksandro Lebedev: Ni povas voĉdoni anticipe.

Abduraĥman Junusov: Ne, post unu jaro ni vidos.

Aleksandro Lebedev: Kaj nun ni voĉdonu pri tio, ĉu Aĥman eniru la Estraron.

Irina Gonĉarova: Aĥman, ĉu por vi gravas esti estrarano aŭ komisiito?

Abduraĥman Junusov: Gravas, ĉar tiam mi subskribos ĉiujn artikolojn kiel estrarano.

[Oni diskutas pri la vortumo kaj prenas vortumon «estrarano pri eksteraj rilatoj»]

Voĉdonado Elekto de Abduraĥman Junusov kiel estrarano pri eksteraj rilatoj.

Por: surloke 10, distance 5.

Kontraŭ 0, 0.

Sin detenis: surloke 1, distance 0.

Decido: Elekti Abduraĥman Junusov kiel estraranon de REU pri eksteraj rilatoj.

2.2 Elekto de la Kontrol-revizia komisiono.

Oni transiras al elekto de Kontrol-revizia komisiono.

Gennadij Basov kaj **Larisa Ŝaposnikova** pretas daŭre labori en la komisiono, Sergeo Ĵilejkin (ne ĉeestas) anticipe rifuzis.

Voĉdonado Elekto de KRK en la konsisto: Gennadij Basov (prezidanto de KRK), Larisa Ŝaposnikova.

Por: surloke 11, distance 5.

Kontraŭ 0, 0.

Sin detenis: 0, 0.

Decido: Elekti Kontrol-revizian komisionon en la konsisto: Gennadij Basov (prezidanto de KRK), Larisa Ŝaposnikova.

2.3 Elekto de aliaj komisiitoj

Pri KAOEM

Vladimir Minin: Tiuj gvidantoj de KAOEM demandas, ĉu estos iu komisiito pri kontaktoj kun ili?

Gennadij Basov: Ĉu REU ĝenerale bezonas tiun komisiiton?

Aleksandro Lebedev: Ŝajne, ne...

Gennadij Basov: Kiujn plusojn ni povas de tio ricevi?

Tatjana Loskutova: KAOEM-anoj ankaŭ min demandis pri la samo, ĉu estas iu komisiito. Kiam ili raportas pri azia movado, ili neniam mencias Rusion, ĉar ili nenion scias pri ni. Do, vere iu reprezentanto bezonatas, sed devas esti respondeca persono. Do, oni konsideru, ke necesas trovi tiun homon en la azia parto de Rusio.

Gennadij Basov: Bojĉin?

Irina Gonĉarova: Bojĉin rifuzis esti reprezentanto de REU en Fora Oriento kun la vortoj «Mi ĝenerale flankiĝis de Esperanto nun».

Gennadij Basov: Mi supozas, ke iun apartan personon nun ni ne bezonas. Ili povas senpere kontakti kun la Estraro. Aliokaze necesos fondi en REU komisionon pri Eŭropo, Afriko kaj tiel plu.

Nikolao Gudskov: KAOEM-anoj ŝatas, ke estu iu homo el Azio, necesas estimi tiun deziron.

[Oni skrapas la nukojn pri Katerina Arbekova, krasnojarskanoj kaj tiel plu, nenion decidas kaj lasas la aferon al la Estraro por plia esploro]

Pri fondo de ILEI-sekcio en Rusio

Irina Gonĉarova: Ni ne forgesu parolon de Jelena Nadikova pri kreo de ILEI-sekcio. Ĉu ni ne bezonas komisiiton en ŝia personeco pri tiu afero?

[Oni persvadas Jelena-n fariĝi komisiito pri kreo en Rusio de ILEI-sekcio]

Voĉdonado

Por: surloke 15, distance 5.

Kontraŭ: 0, 0.

Sin detenis: 0, 0.

Decido: Elekti Jelena Nadikova komisiito de REU pri kreo en Rusio de ILEI-sekcio.

Pri dokumentaro

Aleksandro Lebedev: La sekva afero. Dum la pasinta oficperiodo ni havis komisiiton pri dokumentado — Viktoron Arolviĉ. Mi demandis lin, ĉu li pretas resti je tiu posteno, kaj li respondis, ke fakte ne ŝatus. Pro la aĝo kaj okupateco pri sia profesia laboro. Mi proponas danki Viktoron pro la multjara bona laboro.

Voĉdonado

Por: unuanime.

Decido: Danki al Vikroto Arolviĉ pro lia multjara bona laboro en diversaj postenoj.

Moderigado de dissendolistoj

Vladimir Minin: Ekzistas dissendolisto «Rusia Esperanto-agado». La administrantoj estas Aleksandro Lebedev, Aleksandro Mitin, Aleksandro Osokin, Jurij Karcev. Sed mi rigardis kaj vidis en la informo pri la listo, ke estas 6 posedantoj de tiu listo. Kiuj estas aliaj 2 posedantoj?

Aleksandro Lebedev: Simple Aleksandro Mitin kaj mi havas po du retadresojn, kiuj «membras» en tiu listo. Do la personoj fizike estas kvar, sed la adresoj estas 6.

Vladimir Minin: Ĉu Osokin estas membro de REU?

Aleksandro Lebedev: Ne.

Vladimir Minin: Kial li estas administranto?

Aleksandro Lebedev: Li dum multaj jaroj estis administranto de «REU-agado» kaj «Esperanto-rus-informoj», kaj pro estimo al li mi aldonis lin ankaŭ al la nova listo kiel administranton.

[Tatjana Loskutova grumblas]

Aleksandro Lebedev: Tiu ĉi listo estas ne nur listo de REU, sed estas dissendolisto por ĉiuj rusiaj esperantistoj.

[Palavroj pri administrado de la listo]

Vladimir Minin: Ĉu en ajna momento ajna el la 4 administrantoj povas moderigi iun mesaĝon? Do, se unu el ili forcenzurigas iun mesaĝon, la aliaj eĉ ne scias, kio estas forcenzurita?

Aleksandro Lebedev: Povas okazi. Kiu la unua ekvidis spamaĵon, estis ĉekomputile laj havis liberan tempon por tralegi tiumomente, tiu la unua forbaras tiun leteron.

[Palavroj pri moderigado de la listo]

3 La tria kunveno, la 22-an de aŭgusto, matene

3.1 Raporto pri la unua Kunveno de la novelektita Estraro

Aleksandro Lebedev: Teorie devis okazi kunveno de la novelektita Estraro. Bedaŭrinde, mi iom fuŝis tiun aferon, ĉar hieraŭ ĉiuj rapide diskuris, kaj mi ne sukcesis ĉiujn kapti ĝustatempe, hieraŭ mi sukcesis interparoli nur kun Nikolao.

Fakte, kion ni devas diri, necesas konfirmi la distribuon de taskoj. Pri tio estas pli-malpli klara afero.

Distribuo de taskoj:

Abdurahman okupiĝos pri amaskomunikiloj kaj eksteraj rilatoj.

Nikolao kiel kutime okupiĝos pri eldona agado. Krome, li okupiĝos pri preparo al SAT-kongreso, kiu okazos sekvajare.

Aleksandro Lebedev okupiĝos pri la paĝaro kaj ĝeneralaj aferoj, transprenos dokumentojn ĉe Svetlana kaj ekokupiĝos pri ekhavo de banka konto por REU.

Svetlana okupiĝos pri la blindula kongreso (IKBE), krome ŝi okupiĝos pri instru-metodika laboro (kune kun Irina).

Irina okupiĝos ĉefe pri informado, krome pri instru-metodika laboro (kune kun Svetlana), pri kreo de ILEI-sekcio (helpante al la komisiitino pri tio Jelena Nadikova, se necesos), pri regiona agado.

Aleksandro Mitin okupiĝos pri membraro, retaj servoj (grupoj, dissendolistoj).

Gennadij Basov: Kiel jam estis menciita en la raporto de la Estraro, estis provo kompili buĝeton. Aŭ financan planon de la organizaĵo. Mi supozas, ke tio estas bona instrumento, sufiĉe klara por ĉiuj, se ĝi estas normale kompilita. Kaj mi supozas, ke ĝuste aŭtune necesas tiun laboron komenci. Kaj komence de decembro tiun financan planon aŭ buĝeton akcepti. Tie devas esti nepraj partoj: projektoj, kiuj postulas financadon flanke de REU. Ankaŭ devas esti programoj. Programoj estas io, kio daŭras sufiĉe longe. Projektoj kutime daŭras ne tro longe (unu, du, tri semajnoj, monatoj, eble eĉ jaron). Kaj programoj daŭras longe.

Tion necesas vaste anonci. Kaj necesas flanke de REU subteni finance tiujn projektojn kaj programojn. Por ke oni povu pli-malpli klare fonti buĝeton de la organizaĵo. Kaj tiu kolektita mono, kiu estas kolektita, devas esti normale elspezita. Ĉar simple kolekti monon por nekompreneblaj celoj estas tute senutile.

Kaj jen mi alvokas la Estraron al tio. Kaj mi pretas ankaŭ kontribui al tiu ĉi laboro.

Aleksandro Lebedev: Bone.

Gennadij Basov: Kaj silento. Ĉu abrobo, ĉu malaprobo?

Aleksandro Lebedev: Ni penos. Ĉu ni sukcesos, ĉu ne...

Gennadij Basov: Certe ne eblas tuj verki normalan financan planon. Almenaŭ faru konstante tiujn aferojn. Ni provu. Eble ni eraros. Sed tutegale, laŭ mi, tio estas sufiĉe bona instrumento kaj bona montro, ke REU tamen ion faras, ne kaŝe, kiel decas en nekomercaj organizaĵoj. Kaj tiamaniere ni povus instigi homojn pli volonte kotizi. Kaj eble iam ni venos al ideo, ke ne necesas iu fiksita kotizo, prenita de plafono, sed ĝia sumo deiru de realaj bezonoj de la organizaĵo.

Irina Gonĉarova: Antaŭ ol fari financan planon ni bezonas fari ĝeneralan planon de la laboro. Nur el ĝi ni povos vidi, kiuj agaddirektoj kaj konkretaj agoj bezonas financadon. Mi opinias, ke ni apenaŭ povas dum restantaj horoj kompili seriozan planon.

Aleksandro Lebedev: Kiel mi komprenas, tio ne estas tasko por proksimaj horoj, sed por la aŭtuno.

Gennadij Basov: Mi alvokas la tutan Estraron esti atenta pri tio ĉi. Kaj vi absolute pravas. Necesas havi agadplanon. Ĉar el aero verki financan planon ne eblas.

Irina Gonĉarova: Tiam ni akceptu tiun ideon, malnovan jam, de Geĉjo kiel rekomendon por plia laboro, ĉar nun ĉi tie [dum la Konferenco] ni ne povas fari ion konkretan.

Valentin Melnikov: Mi ŝatus diri, ke antaŭ kelkaj jaroj, ankoraŭ en tempoj de Smetanina, mi petis klarigon: kial la individua kotizo estas ĝuste tia, sed ne pli, ne malpli. Argumenti la grandecon de la kotizo. Mi neniun respondon ricevis, kaj mi ne komprenas, kial oni pagas ĝuste tiom, sed ne duoble aŭ

duone. Do, mi ŝatus vidi publikigitan argumentadon, kalkuladon: kial la kotizo estas ĝuste tia.

Gennadij Basov: Antaŭe [la kotiztabelo] estis farata laŭ kutimo. Simple estu 250 rubloj, aha!

Valentin Melnikov: Tio estas neserioze, konsentu.

Gennadij Basov: Jes, kompreneble. Dank' al la pandemio eble iu sumo kolektiĝis, sed antaŭe estis ĝenerale misordo. Kaj kiam Aleksandro iĝis Prezidanto, ni (KRK) ekvidis, ke unue estas pli klara moncirkulado, provo fari buĝeton...

Aleksandro Lebedev: Estis provo komence de la pandemia jaro, do pro tio tiu provo fiaskis.

Gennadij Basov: Do, mi proponas min kiel kunlaboranton en tiu ĉi direkto.

Valentin Melnikov: Jes, mi ŝatus, ke Geĉjo tion esploru, kalkulu kaj publikigu argumentadon de la sumo de la kotizo.

Gennadij Basov: Mi ŝatus kunlabore tion fari. Kaj deirpunkto estas ĝuste plano de agado. Konkreta plano por la sekva jaro. Necesas alvoki homojn kun iniciatoj por diversaj projektoj. Ekzemple, jen tiu projekto «Unu leciono por lernejanoj» estas brilega laŭ mi. Ĝin nepre necesas financi, buĝetigi kaj tiel plu. Eble aperos ankoraŭ iuj projektoj. Pri programoj ni povas poste pridiskuti.

Nikolao Gudskov: Estas malgranda rimarko, ke tiaj projektoj kiel «Unu leciono por gelernantoj» estas por la buĝeto ne antaŭvideblaj, ĉar tiu projekto aperis jam fine de la jaro. Iuj projektoj bonaj aperas pli-malpli subite, do ilin ne ĉiam eblas antaŭvidi por meti en la buĝeton.

Gennadij Basov: Antaŭ ĉio devas esti agadprogramo.

Gennadij Basov: Mi ŝatus levi demandon pri tiu «Fonduso de Kondratjev». Mi ne komprenas, kial devas ekzisti tiu aparta fonduso, en kiu rilato ĝi estas kun REU, iu aparta afero. Mi zupozas, ke tiun programon eblas ŝovi en la buĝeton. Tiam estos klara situacio. Ni tiel montras nian rilaton al tiu ĉi projekto.

Aleksandro Lebedev: Ni (REU) partoprenas en tiu fonduso, dum lastaj jaroj ni donacis al ĝi monon el la kaso.

Gennadij Basov: Sed ĉu estas senco, ke ĝi ekzistu aparte?

Nikolao Gudskov: La senco estas, ĉar estas fonduso por libervolaj donacoj, kaj iuj homoj jes donacas.

Gennadij Basov: Nu bone, eble estu tiel. Estu aparte fonduso, kaj aparte iu streketo en la financa plano.

Gennadij Basov: Ĉiu pozicio en la financa plano devas esti defendata de la proponantoj. Nu, vi mem scias, kiel oni debatas pri la buĝetoj en la parlamento.

Abduraĥman Junusov: Estas dirita la vorto «agadplano», sed mi supozas, ke krom tio devas esti io pli vasta, iu koncepto. Kion ni volas, kien ni iras, per kiuj rimedoj, por kiuj celoj. Estas bone ellabori almenaŭ skize tiun koncepton, koncepton de REU-agado.

Iu: Ĝi estas esprimita en la Statuto. Por kio ĝin refari.

Gennadij Basov: Eble, pli konkretigi.

[Oni rememoras pri socialisma konkurado, ranglisto de kluboj kaj pri similaj aferoj]

Vladimir Minin: Kaj nun estas kapitalisma konkurado.

Irina Gonĉarova: Mi tre ŝatas tion, kion diris Aĥman. Tio, kio estas skribita en la Statuto antaŭ cent jaroj estas ĝeneralaĵoj. Ni havas novan epokon ĉiujare. Kaj nia agado devas adaptiĝi al novaj tempoj. Kaj almenaŭ ĉiukonference necesas rerigardi la situacion en la lando kaj pripensi strategion. Necesas almenaŭ pridiskuti tion por ke ni komprenu, kie ni estas, por kiuj celoj ni ekzistas, ĉu ni estas formortantaj mamutoj? Ekzemple, mi daŭre okupiĝados pri junulara movado.

Nikolao Gudskov: Verdire, la ĉefa ideo estas ĉiam plia enretiĝo de la esperantista vivo. Tio ne signifas, ke ĉiuj ceteraj direktoj estas negravaj. Sed tio devas esti la ideo, pri kiu ni pensu. En tiu senco, la ideo, kiun lanĉis kaj plenumis Aleksandro [retaj kunvenoj «Retoj»], ĉu bone, ĉu neperfekte, tio estas se ne la ĉefa direkto nun, sed strategie ĝi estas la ĉefa direkto, kaj necesas pri tio pensi.

3.2 Pripenso de estontaj aranĝoj, ideoj por nova agadperiodo

VER-18

Jelena Kuznecova: Se ne malhelpos kondiĉoj pri la pandemio kaj vakcinado, mi planas organizi VER-18. Kie? Estas du variantoj: Saratov aŭ Jaroslavl. Saratov estas pli proksima al mi.

Nikolao Gudskov: Sed en Saratov ne estas esperantistoj.

Irina Gonĉarova: Ne gravas.

Aleksandro Lebedev: Jes, tio ĝenerale ne estas argumento por ne fari aranĝon. Esperantistoj venos el aliaj lokoj kaj bone pasigos tempon.

Nikolao Gudskov: Lokaj organizantoj ne estas. En Jaroslavl ni povas trovi...

Jelena Kuznecova: Tio ne gravas.

Irina Gonĉarova: Grava rimarko. Homoj, ni povas elekti absolute ajnan urbon en la mapo de Rusio. Eĉ kie ne estas esperantistoj. Sed anticipe sendi tien aktivulon estas bone. Ĝuste tion necesas enmeti en financan planon de REU. Kaj ekzemple, se Lena apud Penza loĝas kaj kelkfoje iris al Penza por fari anticipajn organizajn aferojn — eble, REU financu tion. Do, ajnan urbon preni kaj sendi tien aktivulon, kaj iel subteni, pripagi vojon, ekzemple.

[Oni ŝercas pri VER ĉe Kaspia maro kaj tiel plu]

Jelena Kuznecova: La renkontiĝo okazos en ĉi-jara novembro dum novembraj festoj.

Irina Gonĉarova: Tio kolizios kun Ŝelest.

Jelena Kuznecova: Tutegale homoj elektos, kien veturi.

Aleksandro Lebedev: Nu, elektu la organizanto. Kiujn datojn Jelena elektos, en tiuj ŝi faru.

Aleksandro Lebedev: Persone mi jam kelkfoje al diversaj homoj diris, ke estas idiotaĵo, ke en Rusio oni alkutimiĝis alkroĉi aranĝojn al festoj. Dum festoj biletoj kaj hoteloj-bazejoj kostas pli multe kaj estas pli rapide elaĉetataj-okupataj.

Jelena Kuznecova: Dum aranĝoj iuj nun eĉ labori povas.

Aleksandro Lebedev: Do, Jelena, al vi estas granda peto. Kiam vi decidos, kie okazos la aranĝo kaj kiam, bonvolu sendi anoncon al mi kaj al Nikolao por li publikigu en «Ponto». Aliokaze li vin skoldos.

Novojarsk

Vladimir Minin: Novojarsk estas planata. Se la pandemio ne furiozos, do eble Novojarsk okazos en Novokuznecko.

APERo

Irina Gonĉarova: Pri Apero ni pensas, ke eble eĉ ĉi-jare ion organizos kaj nomos tion APERo, por ne perdi la jaron. Sed ankoraŭ ni ne serioze pridiskutis tion. Nu, kompreneble, ĝenerale ni planas daŭrigi APERojn. Laŭ la cirkonstancoj. La ĉefa problemo nun estas, ke ni perdis la ejon, kaj necesas serĉi. Tamen, tio estas nur laboro, sed ne problemo.

Blindula kongreso (IKBE)

Nikolao Gudskov: REU asistas en tiu aranĝo tiusence, ke eble necesos helpi al blinduloj. Tio ĉefe rilatas al moskvanoj [iom volontuli dum la aranĝo].

SAT-kongreso

Nikolao Gudskov: SAT-kongreso okazos de la 30-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto en Moskvo. Ĝi estas la plej granda internacia aranĝo, kiu nun povas okazi en nia lando. Pro tio ĝi estas grava. Post la pandemio ni ne scias, kiuj estos kondiĉoj, ĉu la limoj malfermiĝos aŭ ne. Se la limoj ne malfermiĝos, tiam la kongreso denove okazos en la virtuala formo. Sed ankaŭ tiuokaze ĉion devos organizi ni. La

virtualan SAT-kongreson organizi ne estos tiom malfacile, kiom la realan, tamen ankaŭ tio havas siajn subakvajn ŝtonojn, pri kio necesos pensi.

Ni tamen esperu, ke SAT-kongreso okazos normale ĉeeste. Kaj se ĝi estos normala ĉeesta, tiam ĝi postulos grandajn organizajn fortojn. Kaj mi petas ĉiujn pensi, kiu kion povas fari tiurilate.

Irina Gonĉarova: Eĉ se ĝi estos malvirtuala, eble necesos organizi virtualajn aferojn por partoprenigi distancajn homojn. Tiam eble necesos antaŭvidi financajn rimedojn por tio kaj enmeti en la financan planon.

Nikolao Gudskov: Mi havis unu grandan esperon, kiu finiĝas per granda senreviĝo. De la organiza flanko povus nature helpi turisma firmao. Sed tiu turisma firmao, pri kiu mi pensis, ne plu ekzistas. Do, ni devas ĉion fari memstare per propraj fortoj. Sen tiuj ebloj, kiujn donas komerca organizo.

Vladimir Minin: Ĉe Taŭriono estas konata turisma firmao, kiu povus proponi siajn servojn por organizi SAT-kongreson kaj eble IKBE-kongreson.

Nikolao Gudskov: Pri la blindula kongreso ĉio estas pli-malpli solvita, car ĝin forte subtenas neesperantistaj blindulaj organizoj en Rusio. Kaj pri Taŭriono — ni kun li parolos, dankon pro la sugesto.

[Oni daŭre pripensas, kiujn personojn eblas konsulti pri la organizaj aferoj]

Nikolao Gudskov: Nu ni vidos. Sed pri pure Esperanta flanko mi ĉiujn petas enpensiĝi. Ĉar tio tre gravas. Kiu gvidos ekskursojn, kiu prelegos, kiu koncertos.

Renkontiĝo de amikoj

Vladimir Minin: En la 2022-a jaro aŭguste en Kaliningrado okazos «Renkontiĝo de amikoj — 16», kiun organizos Katerina Arbekova el Novosibirsko. Verŝajne, siberiaj esperantistoj veturos al Kaliningrado por partopreni tiun aranĝon.

Nikolao Gudskov: Ĉu Arbekova kontaktis Korĵenkovon rilate la aranĝon?

Vladimir Minin: Jes. Korĵenkov konsilis al ŝi fari la aranĝon en la urbo, sed ne ĉe la maro.

Tempoj kaj urboj

Irina Gonĉarova: Ni kun Jelena Kuznecova ŝatus daŭrigi la aranĝon «Tempoj kaj urboj». Mi tre ŝatis, kion diris Aleksandro: kial ni alkroĉiĝas al festoj? Tamen, ĉi-foje ni verdire, denove faros dum festotagoj, en junio. Tiu Tago de Rusio. Kial ni neniam okupas ĝin? Aŭ maje. Unuaj majaj aŭ duaj majaj festoj. «Tempoj kaj urboj» estas vidataj de ni kiel konstanta aranĝo. Kaj la ideo estas ĉiam ŝanĝi urbojn.

3.3 Diversaĵoj

Aleksandro Lebedev: Ĉu ni bezonas ion pridiskuti ankoraŭ, kion ni ne pridiskutis?

Irina Gonĉarova: Eble ni interŝanĝu kelkajn frazojn pri junularo? Pri tiu generacio, kiun ni devas kreskigi. Verdire, ĝi mem kreskas. Eble, estas iuj konsideroj, ideoj, konsiloj? Fakte, mi ŝatus specialan junularan aranĝon fari apartan. Kaj mi parolis pri tio kun Aleksandr Blinov. Mi partoprenis la tendaron de Blinov, estis tre bona tendaro. Tie dek gejunuloj lernis ĉe mi Esperanton. Kaj estas multe da entuziasmo, minimume miaflanke, fari ion por la aĝo de 10 ĝis 21. Ni komencos de io malgranda, eble 12 partoprenantoj-infanoj plus bonparolantaj esperantistoj por fari indan lingvan fonon. Tio estos strikte lingva tendaro kun multo da Esperanto. Estas svagaj planoj, tamen ni kun Blinov sufiĉe serioze parolis pri tio.

Nun ĉe mi lernas deko da gejunuloj, kaj ĉiusomere mi instruas infanojn. Do, mi ŝatus fari tion ne vane, sed poste fari al ili iun perspektivon por renkontiĝi.

Nikolao Gudskov: Tio jam apartenas ne al junulara movado, sed al porinfana agado, kio eĉ ne tro koincidas. Pri infana agado iam ekzistis speciala direkto, kaj estis homoj, kiuj estis fakuloj ĝuste pri tio: Kontrov, Kalaŝnikov, Vŝivceva, Roĵdestvenskij. Nuntempe tiu sperto rompiĝis. Do, oni devas komenci de nulo. Bonege, ke oni jam vin invitis, kaj vi ion lanĉis, sed devas esti ankaŭ homoj sufiĉe junaj. Kiam Kalaŝnikov kaj Kontrov pri tio okupiĝis, ili mem estis junuloj.

Irina Gonĉarova: Mi komprenas, ke ni multon deziras, ke ni havu. Sed ni havas nur tion, kion ni havas. Kaj, bedaŭrinde, ni havas min nun nur.

Aleksandro Mitin: Mi havas kelkajn komentojn. Fakte, ni ja havas junularon, kaj tiu ĉi generacio estas bela en posedo de Esperanto kaj tiel plu. Sed kiun problemon mi vidas, ekzemple — ni havas tre malmulte da mezaĝaj homoj, kiuj povus esti la ligo inter maljunuloj kaj junuloj. Estas vera problemo, ke ni ne havas homojn en tiu plej aktiva aĝo. Kion ni havas? Multe da junularo, kiu ellernas Esperanton, etosumas kaj tiel plu. Kaj poste aperas familioj, ili malaperas. Ĝis la emeriteco, kiam ili revenas en la movadon. Tio estas problemo — kiel tiun junularon teni en la movado, kiam ili jam ne estos junularo. Ili malaperos, certe.

Irina Gonĉarova: Nun estas interesa situacio en «MASI», kiu iam poziciigis sin kiel junulara organizaĵo. Nun en ĝi estas mezaĝuloj. Ni momente havas 37 membrojn, kaj tio estas mezaĝuloj. Kaj la afero estas organizi por ili ion interesan, indan. Por ke ili ne ĉesu interesiĝi, por ke ili restu. Tio estas jam alia problemo, ĉar homoj estas tre okupitaj en tiu aĝperiodo, kaj ni devas proponi vere allogajn aferojn. Kaj tiun sperton ni havas malpli ol organizi ion por gejunuloj aŭ por tre aĝaj homoj. Kaj, male, mi miras, ke ni havas mezaĝulojn de 35 ĝis 55. Tio estas baza membraro de «MASI» nun.

Aleksandro Mitin: Kial mi tion diras nun. Unue, mi estas el Niĵnij Novgorod. En mia urbo estis multe da junularo en la 90-aj jaroj. Ili ĉiuj estas kaj iam intekomunikiĝas, sed jam sen Esperanto. Eble, post 20 jaroj ili revenos, sed ne nun.

Irina Gonĉarova: Ili ne revenos. Estas simple alia tempo. Tempoj ŝanĝiĝas. Kaj homoj estas aliaj. Kion ni vidas nun en la nuna Konferenco — tio estas restaĵoj de la pasinteco. Ĉar ni ne povas esti aktualaj. Ni ne povas allogi 40-aĝulojn. Ni ne havas ĝustan strategion por nova tempo. Kaj tial ni ŝrumpas, ĉar ni de la pasinta jarcento tiras niajn tradiciojn. Ni havas tradician RET'on kun tri personoj-olduloj. Tio ne signifas, ke ne estas aliaj homoj. Simple ni ne kapablas interesigi in pri tio.

Aleksandro Mitin: Fakte, jes. REU laboras por tiuj homoj, kiuj jam estas ene. Kaj kiam mi vidis la tagordon [de tiu ĉi Konferenco] — pri la pasinta agado ni havas kelkajn horojn, pri la estonta ni havas 15 minutojn por pripensi ideojn plus 15 minutojn por «diversaĵoj». Bezonatas iu cerbsturmo kaj tiel plu.

Irina Gonĉarova: Mi konsentas. Ni devas kolektiĝi por generi ideojn, por meti novajn taskojn.

Gennadij Basov: Sed almenaŭ ni nun ne en tendoj dormas.

Irina Gonĉarova: Jen. Tio estas ĝojo de olduloj.

Aleksandro Lebedev: Estas propono fini.

3.4 Agordo de formalaĵoj. Fermo de la Konferenco

Aleksandro Lebedev: La registraĵoj estos en Jutubo. La protokolo en teksta formo estos en «Ponto» kaj en la paĝaro.

Aleksandro Lebedev: Mi dankas al ĉiuj, kiuj venis por la Konferenco, deziras al ĉiuj bonan veturon hejmen, sukcesojn en via Esperanto-agado kaj via vivo, kaj estu sanaj.

[La Konferenco estas fermita]

Listo de la decidoj

1. Pritaksi la laboron de la Estraro en la raporta periodo kontentiga.
2. Aprobi la laboron de Kontrol-revizia komisiono en la raporta periodo.
3. Laŭdi la agadon de Jelena Kuznecova dum la raporta periodo.
4. Danki al Abdurahman Junusov pro la elstara informagado.
5. Daŭrigi la funkciadon de la Estraro de REU en plena konsisto.
6. Elekti Abdurahman Junusov kiel estraranon de REU pri eksteraj rilatoj.

7. Elekti Kontrol-revizian komisionon en la konsisto: Gennadij Basov (prezidanto de KRK), Larisa Ŝaposnikova.

8. Elekti Jelena Nadikova komisiito de REU pri kreo en Rusio de ILEI-sekcio.

9. Danki al Vikroto Arolovic pro lia multjara bona laboro en diversaj postenoj.

Distribuo de taskoj ene de la Estraro

Abdurahman Junusov: amaskomunikiloj kaj eksteraj rilatoj;

Aleksandro Lebedev: la paĝaro kaj ĝeneralaj aferoj; transprenos dokumentojn ĉe Svetlana kaj ekokupiĝos pri ekhavo de banka konto por REU;

Aleksandro Mitin: membraro, retaj servoj (grupoj, dissendolistoj), paĝaro;

Irina Gonĉarova: ĉefe okupiĝos pri informado, krome pri instru-metodika laboro (kune kun Svetlana Smetanina), pri kreo de ILEI-sekcio (helpante al la komisiitino pri tio Jelena Nadikova, se necesos), pri regiona agado, pri junulara movado;

Nikolao Gudskov: eldona agado, preparado al la SAT-kongreso;

Svetlana Smetanina: la blindula kongreso (IKBE), instru-metodika laboro (kune kun Irina Gonĉarova).